

EL POPOLA ĈINIO


中國報道

3 1981







Laborejo en freša aero



Parto de la fabriko



Fabriko en ĝardeno



Oni nomas la Wuxi-an Elektrokemian Fabrikon “fabriko en ĝardeno” pro tio, ke en ĝia korto troviĝas verdaj gazonoj, multaj arboj, bambuoj kaj buntaj floroj kaj ĝi prezentas kvietan medion kun freŝa aero.

La fabriko produktas per elektrokemia reakcio kalcian karbonidon, kaŭstikan sodon, polivinil-kloridon k.a. Se oni nebone traktas tiujn toksajn substancojn, ili povas kaŭzi polucion ne nur al la medio de la fabriko — endanĝerigi la vivon de la arboj kaj herboj kaj la sanon de la laboristoj, sed eĉ al la tero kaj akvo je 2 kvadrataj kilometroj ĉirkaŭ la fabriko. Post sia fondiĝo en 1973 la nomita fabriko alprenis diversajn rimedojn de protektado, faris regulajn kontrolojn al la aperturoj de ellaso de gaso kaj malpura akvo de ĉiuj laborejoj kaj reduktis la kvanton de toksaj substancoj ĝis sub la normo difinita de la ŝtato, tiel ke ĝi gardis sian medion kontraŭ polucio, protektis la sanon de la laboristoj kaj akcelis la disvolviĝon de produktado.

Fotoj de **REN SHIYIN**

Laboristinoj legas inter floroj dum ripozhoro.





Medioprotektaj laborantinoj kolektas specimenon de aero.

EL POPOLA ĈINIO

1981
N-ro 3
(270)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Juna skulptistino de la Huishan-
a Fabriko de Argilaj Homfiguroj
Foto de SHU GU

SUR LA DORSKOVRILO:

Printempo (Ĉinstila pentraĵo)
de CHEN XIUFAN

KOLORAJ SERIOJ:

Fabriko en ĝardeno

La pitoreska Songshan-monto

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj
de E-istoj

(1) Nuba maro ĉe Versiliaj Apŭa-
maj Alpoj

(2) Miskantoj (*Miscanthus Japo-
nicus*)

La tibetanoj

Miniatura envaza pejzaĝo

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Projektado de virinaj vestoj

Tigrino de nordorienta Ĉinio nas-
kis kvin idojn jare.

Pupludo de infanoj

Ludo de baskulo kaj trapezo

Enhavo

La media protektado en Ĉinio	2
Beijing penas defendi sin kontraŭ polucio de la medio	6
Novaj vilaĝoj sur la dezerto	9
NIA KULTIVEJO:	
Lingvo, ĉiutaga vivo kaj Esperanto	12
El miaj rememoroj	14
Pri la Internacia Esperanto-Muzeo	16
ESP-NOVAĴOJ	18
La Ĉina Virina Federacio kaj ĝiaj taskoj	20
“Najtingalo” kaj ŝiaj gestudentoj	23
En manĝejo de mallarĝaj vermiĉeloj (novelo)	25
VIDINDAJ LOKOJ: Songshan-monto	27
Tianjin — havenurbo de eksterlanda komerco	30
KURANTAJ AFEROJ	34, 35
Ĉasado en la Malgranda Xing'an-montaro	35
La ĉina ŝako	38
KULTURAJ NOTOJ	38
Pri ĉina ŝakludo	41
SPORTO	42
Simon Bolivar — Nacia heroo de Latin-Ameriko	42
AMIKECO: Amikeco en la koro	44
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Ekskurso de tibetanoj al antaŭurba pitoreskejo	46
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La fondiĝo de la kuo- mintanga Nanjing-a registaro	47
TRA LA MONDO	49

Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La Media Protektado en Ĉinio

LA vasta Ĉinio ĝuas grandan renomon en la mondo pro sia bela naturo kaj la brila antikva kulturo. Sed en la pasinteco ĝi estis longe tretita de imperiismaj landoj. Post naskiĝo de la nova Ĉinio, samtempe kun disvolvo de ekonomio kaj plibonigo de la popola vivo, multe ŝanĝiĝis ĝia media fizionomio. Oni faris forstumon kaj akvo-mastruman konstruadon, per tio plibonigis la kondiĉojn de agrikultura produktado kaj plifortigis la povon kontraŭ naturaj katastrofoj, starigis novajn industriojn en internaj lokoj, kiuj akcelis disvolviĝon de la ekonomio de tiuj lokoj. Ankaŭ multaj laboroj estis faritaj por reformi malnovajn urbojn kaj plibonigi loĝadon de urbanoj. Dank' al disvolvo de la patriota


higiena movado altiĝis la nivelo de sanstato de la popolo.

La laboro pri la media administrado de Ĉinio estis komencita kompare malfrue. Nur post la Konferenco pri la Medio de la Homaro okazinta en Stokholmo en 1972, Ĉinio prenis median protektadon kiel gravan problemon por protekti vivulojn kaj garantii produktadon kaj sanon de la popolamasoj. Ankaŭ serioza polucio de medio de la evoluintaj landoj pro la disvolvo de ekonomio komprenigis al ni, ke samtempe kun disvolvo de la ekonomia konstruado oni ne pre devas atenti la median protektadon.


En 1973 Ĉinio okazigis la Unuan Tutlandan Labor-kunve-

non pri la Media Protektado. De tiam fondiĝis diversnivela administracioj pri la media protektado. En la lastaj jaroj tiu laboro atingis certan sukceson. Unue ni disvolvis reprodukteblan energion. 80% de la ĉinaj loĝantoj sin trovas en la kamparo. En la pasinteco ĉinaj kamparanoj ĉefe prenis tigojn kaj foliojn de vegetaĵoj kaj lignon kiel hejtajon. Laŭ nekompleta statistiko, la kamparo de la tuta lando ĉiujare forkonsumis 500 milionojn da tunoj da tiaj vegetaĵoj, kiuj povas produkti varmon egalan al tiu de 270 milionoj da tunoj da norma karbo. Ĉar granda kvanto da vegetaĵoj ne povis esti uzata kiel sterko por la kampoj, detruigis la grunda strukturo kaj natura medio. Por solvi la problemon de energio en la kamparo Ĉinio aktive konstruis malgrandajn hidroelektrejojn kaj disvolvis metanan utiligon.

Esplorantoj de la Nanjing-a Grunda Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis plurajn rimedojn kontraŭ polucio de insekticido al grundo kaj rizo.



La malgrandaj hidroelektrejoj kun kapacito de kelkaj kilovattoj ĝis mil kilovattoj estas fonditaj por utiligi akvoenergion de malgrandaj fluoj en diversaj lokoj. Nun pli ol 1,500 gubernioj de la tuta lando funkciigis sume pli ol 90,000 tiajn elektrejojn kun totala kapacito de 6.8 milionoj da kilovattoj. Ili ĉiujare produktas 10 miliardojn da kilovattohoroj da elektro, kiuj konsistigas 40% de la totala konsumkvanto de elektro por la tuta agrikulturo. Laŭ enketado, Ĉinio nun utiligis nur 5% de sia



akvoenergio por malgrandaj hidroelektrejoj, tio montras, ke la neutiligita akvoenergio estas tre granda. Nun la konstruado de tiaj hidroelektrejoj daŭras en diversaj lokoj de Ĉinio.

Metano estas brulgaso akirebla per fermentado de rubaĵoj, fekaĵoj kaj vegetaĵoj en hermetika baseno. Ĉar metano estas facile akirebla kaj malkara kaj ne kaŭzas polucion, ĝi estas varme akceptata de la kamparanoj. 21 gubernioj de Ĉinio jam ĝeneraliĝis uzadon de metano en kamparo. Nun oni komencis uzi ĝin en produktado. En la tuta lando oni jam fondis 560 malgrandajn metanajn movfortajn staciojn kaj 150 malgrandajn metanajn elektrejojn. Vasta apliko de metano ne nur estas unu el la rimedoj por solvi la problemon de energio de la kamparo, sed ankaŭ multe plibonigis ĝian medion.

Ni atingis certan sukceson en reformo de sablozaj dezertoj. Laŭ la malsamaj dezertoj, ni plantis arbojn kaj arbedojn en kombino, aŭ arbojn, arbedojn

kaj herbojn en kombino, aŭ konstruis furaĝajn bazojn por bridi moveblajn sablodunojn de la dezertoj. Ni kulturis forstozonojn kaj plantis herbojn interdunoj por protekti kampojn. Samtempe ni konstruis novajn oazojn utiligante akvan kaj teran fontojn en dezertaj regionoj. De 1978 ni komencis plenumi planon konstrui 5.3 milionojn da hektaroj da forstoj en la nordorienta, norda kaj nordokcidenta regionoj de Ĉinio.

En la pasinteco kemia insekticido ludis grandan rolon por mortigi fiinsektojn kaj protekti plantaĵojn. Sed ĝi kaŭzis polucion al grundo, akvofonto kaj plantaĵoj kaj rekte aŭ malrekte damaĝis sanon de homoj, venenis multajn utilajn insektojn kaj birdojn kaj reduktis naturajn faktorojn kontraŭ fiinsektoj. Por solvi tiun problemon niaj agronomiaj laborantoj faris eksperimentojn kaj trovis biologiajn rimedojn kontraŭ fiinsektoj. Ekzemple, oni uzas ruĝokulan burdon, oran etvespon kaj aliajn utilajn insektojn por mortigi fi-

insektojn kontraŭ plantaĵoj kaj arboj, uzas kontraŭrizborantan bacilon por ekstermi maizpiralidon, pinan vermon kaj rizpiralidon, uzas antibiotikon por kuraci guberelinon (*Pellicularia sasakii*), smuton de milio kaj putriĝon de pomo kaj akiris bonan sukceson en tiuj flankoj. En 1978 oni uzis tiajn rimedojn kontraŭ fiinsektoj sur areo de 6,600,000 hektaroj kaj ekstermis fiinsektojn per anasobredo sur areo de 660,000 hektaroj.

Ni atingis certan sukceson ankaŭ en protektado de sovaĝaj bestoj kaj vegetaĵoj. Ĉinio abundas je sovaĝaj bestoj, inkluzive de 2,077 specoj de birdoj. Ĝi havas pli ol 30 milojn da specoj de altklasaj vegetaĵoj. Ni alprenis la principojn de serioza protektado, multa generado, racia utiligo kaj bredado kaj difinis naturajn rezervejojn. Dank' al tio granda pando, orhara simio, sovaĝa bovo, tigro de nordorienta Ĉinio, nigrakola gruo, ruĝkresta gruo, ĉamo, sovaĝa elefanto, blanklipa cervo kaj aliaj raraj

bestoj, kiuj alfrontas pereon, ricevis protektadon.


Krome, ni efike utiligis forjetojn. Kun disvolviĝo de industria produktado kaj kresko de nombro de loĝantoj, ĉiam plimultiĝas rubaĵoj, kiuj serioze malpurigas medion kaj damaĝas sanon de la popolo. Por solvi tiun problemon, ni kolektis skorion, materialojn kaj malnovajn ekipaĵojn forjetitajn en industria produktado kaj eluzitajn objektojn de la urboj, kaj faris el ili novajn industriajn produktaĵojn kaj industriajn materialojn. De 1956 ĝis 1957 ni kolektis 89 milionojn da tunoj da forjetitaj materialoj kun totala valoro de 19.5 miliardoj da

juanoj. Oni transportis forjetitajn legomojn, fruktoŝelojn kaj aliajn rubaĵojn al antaŭurboj, kie oni faris el ili organikan sterkon.

Nun relative serioza estas la media polucio de Ĉinio. La entena kvanto je sulfura dioksido en aero en multaj urboj superis la normon difinitan de la ŝtato; nombro da riveroj, lagoj kaj internaj maroj estas certgrade malpurigitaj de venenaj substancoj; la subtera akvo de iuj urboj estas malpurigita kaj ankaŭ ĝia akvonivelo malleviĝis jaron post jaro; ankaŭ serioza estas la bruoj en la urboj. Laŭ nekompleta statistiko, en 1979 ĉiutage en Ĉinio ellasiĝis 9.9 miliardoj da


kubmetroj da malpura gaso, je 5.6% pli multe ol tiu en 1978, 78.8 milionoj da tunoj da malpura akvo, je 8% pli multe ol tiu en 1978, forjetigis tutjare 950 milionoj da tunoj da skorio, je 3.6% pli multe ol tiu de 1978. La forjetoj de industrio certgrade damaĝis plantaĵojn de iuj regionoj. La malsanoj kaŭzita de media polucio inkluzive de kancero, kora kaj pulma malsanoj kaj malsanoj kaŭzita de tokso de pezaj metaloj pli kaj pli forte minacas la sanon de la popolo.

Ankaŭ la ekologia ekvilibro de nia lando suferas seriozan detruon. En la lastaj jaroj la areo de sukcese plantitaj arboj de nia lando estis nur 1,040,000 hektaroj ĉiujare, sed 2,500,000 hektaroj da arbaroj perdiĝis pro arbohakado, terekspluatado kaj incendioj. En la lastaj 15 jaroj la areo de dezertigita tero plimultiĝis je 27,000 kvadrataj kilometroj. La areo de stepoj sablizita, kalkizita kaj degenerigita konsistigas seponon de la



Ĉinaj sciencaj laborantoj kolektas specimenojn en la norda parto de la Flava Maro por analizi polucion de maro kaŭzitan de petrolo.


Sciencaj laborantoj de la Vegetala Instituto de Jiangsu-provinco faras eksperimenton por elekti vegetaĵojn taŭgajn por mezurado de polucio kaj purigo de aero.



totala areo de la stepoj en la norda parto de Ĉinio. Krome oni kreis milionon da hektaroj da kampoj per terplenigo de lagoj, kiuj preskaŭ okupas dekonon de la areo de akvo sur la kontinento. Pli kaj pli malboniĝis meteoraj, hidrologiaj kaj grundaj kondiĉoj en multaj lokoj kaj rimarkinde plimultiĝis sekeco.

La kaŭzo kuŝas en tio, ke en la dekjara kultura revolucio la politikoj pri media protektado ne estis bone plenumitaj, kaj la grena produktado estis tro emfazita, pro kio detruigis stepoj, arbaroj kaj lagoj. Post la frakaso de la "kvarpersona bando" la ŝtato donis grandan atenton al restarigo de la nacia ekonomio, sed neglektis la median protekton. Nun nia registaro tre atentigas tiun problemon. Ĝi postulas ke la malnovaj entreprenoj eliminu sian polucion en difinita tempo kaj la novaj entreprenoj havu rimedojn kontraŭ polucio. Por protekti la naturan medion, ni emfazas fari plenamplksan planon laŭ naturaj kondiĉoj kaj bezono de la nacia ekonomio dum ekspluatado kaj utiligo de naturaj riĉfontoj kaj samtempe disvolvi agrikulturon, arbaron, brutobredadon, flankajn okupojn kaj fiŝadon. Nun ni jam metis la median protekton en la perspektivan planon por disvolvi la nacian ekonomion.

En 1979 publikigis la leĝoj pri la protektado de medio, arbaro kaj akvofontoj. Nun oni elaboras leĝojn pri tero, stepo, konservo de akvo kaj grundo, protektado de maroj, leĝojn kontraŭ atmosfera polucio kaj akva polucio, regularojn pri protekto de gravaj riveroj, lagoj kaj maroj kaj raraj sovaĝaj bestoj kaj vegetaloj. Samtempe ni pre-



Esplorantoj de la Fizika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj enketas pri la uzado de bruomildiga aparato en la Beijing-a Unua Fabriko de Universalaj Maŝinoj.

mias la entreprenojn, kiuj bone faras sintezan utiligon, kaj postulas de 1,574 entreprenoj pagon pro ilia ellaso de malpura akvo aŭ gaso aŭ forĵetado de skorio. Tio akcelis bridon de polucio kaj plibonigon de administrado de entreprenoj.

En la lastaj jaroj nia lando intensigis esploran laboron pri la media protektado. Nun pli ol 3, 500 homoj de pli ol 80 institutoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj sin okupas pri tiu laboro. En 1979 stariĝis la Ĉina

Instituto de Media Scienco. Nun konstruiĝis kaj konstruiĝas pli ol 290 kontrolaj stacioj de la media protektado kaj pli ol 4,000 homoj partoprenis en la laboro. Por kulture koncernajn fakulojn 23 altaj lernejoj de Ĉinio funkciigis fakultaton, fakon aŭ lecion de la media protektado. Krome oni aranĝis mallongtempajn kursojn por alterne trejni 15,000 laborantojn pri media protektado en tri jaroj, por ke ili bone plenumu la laboron.

Beijing penas defendi sin kontraŭ polucio de la medio



Mezurado de bruo sur strato

LA donitaĵoj akiritaj de la kontrola centro kaj kontrola aŭtomobilo de media protekto, kiu estis plenumanta sian taskon sur strato de Beijing, en iu decembra frumateno, montris: En tiu frosta vintro, la antena kvanto de polvo kaj sulfura dioksido en aero ellasitaj de malaltaj fumtuboj de hejtaj kaldronegoj de la urbo multe superis la limigon de la ŝtato, kaj la bruo ĉe trafikaj aortoj atingis 73.5 decibelojn, kvankam Beijing havas nur 160 milojn da aŭtoj.

En la kvindekaj jaroj, kiam iuj evoluintaj landoj plendis kontraŭ la media polucio, Beijing estis laŭdata de fremdlandaj vizitantoj pro siaj freŝa aero, dolĉa akvo kaj kvieta medio. Sed post 20 jaroj, senĉese malboniĝis la medio de Beijing. En vintro la aero fariĝis malpura, ofte leviĝas sabla ventego, malboniĝas la fontoj de akvo, pli kaj pli laŭtiĝas la bruo de la

urbo . . . Jen kion konfesis al mi la fakuloj de la Beijing-a Medio-protekta Buroo.

La ĉefaj malpurigantoj de la aero de Beijing estas polvo, sulfura dioksido, nitrogena oksido kaj karbona monoksido. Esplorado alarmis, ke en printempo de 1980, kiam oni hejtis la domojn, ĉiu kubmetro da aero de la urboparto de Beijing entenis 0.23 miligramon da sulfura dioksido, kaj sur ĉiu kvadrata kilometro da tero falis ĉiumonate 39 tunoj da polvo. Ĉe la ĉefaj stratoj Dongdan kaj Xidan la antena kvanto de nitrogena dioksido en aero superis la ŝtatan normon.

Parolante pri la polucio de la akva fonto de Beijing, la fakuloj diris, ke la tuta urbo ĉiutage ellasas 1.8 milionojn da tunoj da malpura akvo, kaj tio serioze damaĝas la purecon de la akvo-fontoj sur kaj sub la tero de Beijing. En iuj lokoj la akvo-

fontoj jam estas malpurigitaj kaj en aliaj lokoj tute malaperis fiŝoj kaj aliaj vivaĵoj en riveroj pro polucio de la akvo. La malmoleco de la subtera akvo montras la tendencon superi la higienan normaron por trinkakvo.

La bruo de Beijing venas ĉefe de industria produktado kaj trafikado. Mezurado montris, ke la bruo en pli ol duono de la fabrikoj superis 85 decibelojn, kaj ĉe la urbocentro la bruo de diversaj veturiloj superis 70 decibelojn. En la loko kie troviĝas multaj fabrikoj kaj ĉe trafika centro, la laboro, studo kaj ripozo de la loĝantoj estas multe malhelpataj.

La kaŭzoj de la media polucio estas multflankaj. La ĉefa kaŭzo estas rapida progreso de industrio de la urbo. En la lastaj 30 jaroj, Beijing disvolviĝis el konsumo urbo en urbon kun diversaj industriaj branĉoj, inkluzive

de metalurgio, maŝinfarado, kemio, tekstilado, konstrua materialo kaj elektronikaj aparatoj. Kaj cetere, la proporcio de la peza industrio estas tro granda, ĝia produktovaloro konsistigas 64.5% de la totala produktovaloro de la industrio. Tiu proporcio jam superis tiun de Shanghai (Ŝanhajo), la plej granda urbo de Ĉinio. La pezaj industrioj, precipe metalurgia kaj kemia, konsumas grandan kvanton da energio kaj akvo kaj grave malpurigas la medion.

Due, la dispozicio de industriaj entreprenoj estas malracia. Plejparto de la fabrikoj, kiuj okupas grandan areon, multe konsumas energion kaj akvon kaj serioze malpurigas la medion, troviĝas en la antaŭurbo nemalproksima al la urbocentro. Mezurado montras, ke la temperaturo en la urbo estas je 1-2 gradoj pli alta ol en la antaŭurbo, kaj tio kaŭzis centripetan aerokirilon. La fumo kaj polvo ellasitaj de la fabrikoj en la antaŭurbo estas portitaj en la urbocentron, kio serioze malpurigas la aeron en la urbo.

La tria kialo estas rapida kresko de la loĝantaro de la urbo. En la lastaj 30 jaroj, la loĝantaro en la urbo kreskis de 1.6 milionoj ĝis 4.06 milionoj, kaj la denseco de loĝateco atingis 12,100 homojn po kvadrata kilometro, kiu jam superis tiujn de Parizo kaj Moskvo. En la lastaj jaroj, oni rigore praktikis naskolimigon kaj la natura kresko de la loĝantaro iom malrapidiĝis, sed la totala nombro de la loĝantaro ankoraŭ kreskas senĉese. La rapida kresko de la loĝantaro faras trafikon kaj loĝadon de la urbo tre malfacilaj kaj malbonigas senhalte la medion.


La polucio de la medio de Beijing maltrankviligis la urbanojn kaj fremdlandajn vizitantojn. Por rapide ŝanĝi la staton, la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio elmetis proponon en la komenco de 1980, ke oni transformu la fizionomion de Beijing, verdigu kaj purigu la medion. La popolo de Beijing tre aprobis tiun proponon. La popola registaro de Beijing kaj la koncernaj departementoj alprenis diversajn rimedojn por plibonigi la medion de la ĉefurbo. Unue oni komencis rigore limigi multiĝon de industriaj entreprenoj en la urbo. El la 616 fabrikoj situantaj en la urbo, ĉ. 100, kiuj ellasis grandan kvanton da malutilaĵoj aŭ faris bruegon, estis reformitaj aŭ translokita. Ekzemple, la konstruado de la Kemia Fabriko Dongfang kaj la Tekstila Fabriko Sijiqing, kiu situas tre proksime de akvofonto de la urbanoj, estis ĉesigita. Iu granda petrolo rafinejo de Beijing aplikis novan teknikon por

eviti polucion. Dank' al la nova tekniko oni povas malmultigi la nigran fumon kaj ŝpari 30 milionojn da tunoj da hejtaĵo, kiuj antaŭe estis vane forbruligitaj. Nun la entena kvanto de karbona monooksido en la ellasita gaso reduktiĝis de 7% al 0.3%.

Nun ne ĉiuj urbanoj de Beijing uzas gason aŭ likvigitan gason en kuirado. La magistrato planis konstrui koncentran varmprovizan sistemon kaj instigis diversajn entreprenojn uzi novajn kaldronegojn, kiuj povas malmultigi fumon kaj ŝpari hejtaĵon. Nun 50% de la kaldronegoj en la urbo estas reformitaj, kaj dank' al tio la tuta urbo povas malmultigi fuman polvon je 110,000 tunoj kaj ŝpari 800,000 tunojn da karbo. La biciklantoj tre abomenas la fumon ellasitan de aŭtobusoj. Antaŭ nelonge la aŭtobusoj de du linioj en Beijing reformis sian motoron kaj ne plu ellasas nigran fumon. Ankaŭ aliaj aŭtobusoj tiel faros.

Kontrola aŭtomobilo laboras sur strato de Beijing.





Sistemo por trakti malpuran akvon en la Rafinejo Dongfanghong de Beijing

Por eviti polucion de akvofonto, Beijing konstruis interan eksperimentan fabrikan povantan trakti ĉiutage 10,000 tunojn da malpura akvo. Ĝi alprenas la metodon de oksidigado en la traktado, kiu dekoble altigis la laborefikon.

Antaŭ nelonge mi havis la ŝancon rigardi la sistemon por trakti malpuran akvon en la Ĉefurba Fer-ŝtala Kompanio. Ĝi estas la unua ekipaĵo de nia lando, kiu efektivigis cirkulan akvolavadon de altfornaj gastuboj kaj ne ellasis malpuran akvon. Oni taksas, ke tiu ekipaĵo ĉiujare povos repreni gascindron entenantan ferercan pulvoron kun valoro de 1,250,000 juanoj. Laboristoj de la fabriko diris, ke antaŭe la fabriko senĉese ellasis nigran akvon, kiu velkigis vegetaĵojn kaj dezertigis la ĉirkaŭajn kampojn. Sed nun tia stato jam ne plu videblas.

Por protekti la akvofonton de Beijing oni starigis gvidan grupon por zorgi tion. La akvozervejo Guanting, unu el la

ĉefaj akvofontoj de Beijing, antaŭe estis malpurigita de granda kvanto da akvo ellasita de fabrikoj. Poste, la provincoj Hebei, Shanxi kaj la municipoj Beijing kaj Tianjin kune faris grandan klopodon por rebonigi la kvaliton de la akvo. Nun la entena kvanto de fenolo, cianido, arseniko kaj kromo en la akvo jam estas sub la limigo de la ŝtato. En 1980 la akvozervejo liveris al la merkato 400 tunojn da fiŝoj.

Nun la popola registaro de Beijing klopodas por protekti la medion per leĝoj kaj decidis monpuni mediomalpurigantojn. La fabrikoj, kiuj sidas en malkonvena loko, devas bone trakti siajn ellasitajn malutilaĵojn en limigita tempo, aŭ translokiĝi. La Ĝenerala Fabriko de Aŭtopeco de Beijing havas 11 filiojn en la urbo, kies pli ol 100 preĝmaŝinoj eligis malagrablan bruegon. Laŭ la koncerna leĝo pri bruoj, la magistrato ordonis ke ĝi konstruu novan preĝfabrikan en la antaŭurbo de Beijing kaj tie prilaboru la aŭtopecojn. En 1980, por malaltigi la bruon de

aŭtobusoj, la Beijing-a Ĝenerala Kompanio de Publika Trafiko anstataŭigis la kornojn de la aŭtobusoj per mallaŭtaj kornoj.

Beijing situas ĉe la norda rando de la Nordĉinia Ebenaĵo kaj estas ofte atakata de sabla vento venanta de la Interna Mongolio kaj la nordokcidenta Loesa Altebenaĵo. Por bari la sablan venton, oni faris grandan penadon en la lastaj 30 jaroj. En la antaŭurbo de Beijing oni forstumis 8,000 hektarojn da tero, kulturis surmonte pli ol 70,000 hektarojn da arboj. Ĝis 1965, en la tuta Beijing oni plantis pli ol 20,000,000 arbojn, kiuj ludas bonan rolon en protekto de la medio de la urbo.

En la lastaj 3 jaroj la magistrato de Beijing donis grandan atenton al la verdigado de la urbo. La loĝantaro de Beijing plantis 2 milionojn da diversaj arboj. Antaŭe en la urbo troviĝis ege malmultaj gazonoj. De 1978 oni jam kulturis gazonojn kun areo de 1.12 milionoj da kvadrataj metroj.

En 1980 multaj fabrikoj plantis arbojn por beligi sian medion. La Beijing-a Koaksiga Fabriko kovris trionon de sia libera areo per arboj kaj gazonoj. En ĝi la oficistoj kaj laboristoj starigis 7 malgrandajn parkojn. La Beijing-a Optik-instrumenta Fabriko gazonigis areon de 5,300 kvadrataj metroj, kaj tiel la libera areo de la fabriko estis tute verdigita. Nun 22% de la areo de Beijing estis kovritaj de arboj. Kompare kun multaj fremdlandaj urboj bone verdigitaj, tiu cifero estas ankoraŭ tre malgranda, tial oni devas fari ankoraŭ longajn penadojn por verdigi la medion de Beijing.

Novaj Vilaĝoj sur la Dezerto

EN serenaj tagoj, kiam vi rigardas malproksimen sur la montpinto Alula en la limregiono de nordokcidenta Ĉinio, tuj trafas viajn okulojn la ondanta montaro Helan en la sudo kaj senlima dezerto Olan-Buh en la nordo. Oriente kaj okcidente sur la dezerto dislokiĝas oazoj kvazaŭ smeraldoj.


En tiuj oazoj estas novaj vilaĝoj, ĉirkaŭ kiuj kreskas prospere poploj, salikoj, pomarboj kaj sablejaj jujubarboj (*Elaeagnus angustifolia*), kaj sterniĝas legomkampoj ambaŭflanke de interkruciĝantaj kanaloj. Tra arbaroj videblas vicoj kaj vicoj da blankaj domoj — lernejoj, vendejoj, kuracejo, klubo kaj prilaborejo de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Kiu ja povus imagi al si ke antaŭ nur dek jaroj sur tiu dezerto furiozadis sabloŝtormo.

En la komenco de la 70-aj jaroj, kiam iu taĉmento de la Lanzhou (Langŝou)-aj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo ekgarnizonis en tiu sabla mondo, tie troviĝis nek arbo nek domo. La tieaj mongolaj, huj-aj kaj manĉuraj paŝtistoj tutjare paŝtis, migrante sur kameloj kun siaj tendoj. Ifoje ili konstruis simplan loĝejon inter sablaj montetoj, tamen pro manko de akvo ili devis forlasi la loĝejon kaj paŝti malproksimen. Iu multe hardita maljuna mongola paŝtisto diris al mi, ke Ulan-Buh signifas ruĝan virbovon en la mongola lingvo. Tiu stranga nomo estas donita de paŝtistoj, kiuj, vizaĝe al sabloŝtormo sub la ardanta suno, imagis al si sovaĝan virbovon kaj kunligis ĝin kun la ŝtormo.

Baldai estis loko, kie ofte blovis ventego. La furioza vento ofte

portis flusablon el Ulan-Buh en tiun lokon. Post kiam la tria bataliono de iu trupo venis tien, ĝi tuj sin ĵetis en la batalon por transformi la dezerton. Tamen estis granda malfacilo konstrui tie domojn kaj trovi akvon. Por trovi akvon oni vizitis ĉiujn paŝtistajn punktojn kaj mongolajn tendojn en la 20-kilometra ĉirkaŭaĵo, observis ĉiujn sablomontetojn kaj sekajn riverfluejojn. Post duonjara penado ili finfine trovis 8 akvofontojn kaj fosis multajn profundajn kavojn kaj boris tri putojn por pumpmaŝino. En la frosta vintro la batalantoj alportis ŝtonojn de proksima monto kaj konstruis per ili cisternon. En la sekvanta jaro ili traboris du sablomontetojn kaj konstruis kanalon longan je 3.5 kilometroj, tiel ke la klara putakvo fluis en Baldai. Kaj dank' al dujara peniga laboro ili

Novaj domoj de paŝtistoj konstruitaj helpe de la Ĉina Popola Liberiga Armeo



unuafaje rikoltis kukurbojn, rafanojn, brasikojn kaj bulbojn sur sia nove kulturebligita tero. Prosperas la pli ol 4,000 poploj kaj salikoj plantitaj de ili. La antaŭa dezerto fariĝis fekunda oazo, kiu tiras al si migrantajn paŝtistojn. Dank' al la unuanima laborado de la armeanoj kaj popolanoj aperis en la vilaĝo lernejo, vendejo, fabriko kaj amuzejo. Poste la armeo instalas alttensiajn fadenojn, tiel ke en ĉiuj vilaĝoj eklumis elektraj lampoj. Kun granda ĝojo la paŝtistoj nomas Bal-dai nova vilaĝo en dezerto!

La novaĵo pri la formiĝo de la vilaĝo rapide cirkulis inter la trupoj. La partia komitato de la armeo speciale sendis 7 laborgrupojn el 42 personoj, kiuj faris esploradon ĉie en la dezerto, diskutis kun lokaj kadroj kaj paŝtistoj pri plano konstrui novajn vilaĝojn. Ĉiuj komunumoj fondis specialan grupon por esplori akvofonton. La trupo helpis ilin per putbora taĉmento. Dank' al pli-ol-unu-jara penado ili boris 16 putojn. Iuj taĉmentoj konstruis digojn en seka riverfluejo por bari la subteran fluon. Fine aperis akvo, kaj la dezerto ekŝanĝiĝis!

Aparte ĝojinde estas, ke oni hazarde trovis klaran lagon kun 36 fontotruoj en la komunumo Hos-Burd en la centro de la dezerto. Tamen, por elkonduki la akvon necesis konstrui kanalon kaj digon.




Hejmo de paŝtisto

La trupo tie garnizonanta iniciative prenis sur sin la taskon starigi akvokondukan konstruaĵon. Granda nombro da armeanoj kun tendoj kaj provianto iris tien kaj post 40 tagoj de peniga laboro ili formovis 28,000 kubmetrojn da sablo kaj tiel enkondukis la klaran akvon en la loĝpunkton. En la tago por solene inaŭguri la kanaleton, la paŝtistoj en festaj vestoj alvenis rajdante sur kameloj kun nutraĵoj kaj trinkakvo el la ĉirkaŭaĵo de 50 kilometroj por festi la ekfunkcion de la akvokondukaĵo.

Samtempe, la trupo organizis ankaŭ konstruan taĉmenton por

fabriki kalkon, brikojn kaj tegolojn kaj konstrui ĉirkaŭmuron kaj domojn. La paŝtistaj familioj, loĝintaj antaŭe en tendoj, kun granda ĝojo transloĝiĝis en novajn domojn. La pli-ol-60-jara mongola paŝtisto Sampil ekde sia infaneco paŝtis kamelojn kune kun sia patro sur la dezerto kaj vivis kiel nomado. Dum la pasintaj jardekoj la sabloŝtormo kaj malsano forrabis de tiu geedza paro la gefilojn kaj la junecon kaj ĝojon. Kiam la armeanoj helpis ilin transloĝiĝi en la novan 3-ĉambran loĝejon kun novaj lignaj pordoj kaj vitraj fenestroj, ili ĝojege diris al ĉiu renkontato: "Ni ja ne revis eĉ en sonĝo ke tian feliĉon ni povas ĝui en maljuneco!"

Migrantaj paŝtistoj



Antaŭe la tieaj paŝtistoj devis iri 20-25 kilometrojn por aĉeti eĉ plej malgrandan vivbezonaĵon. Informiĝinte pri la deziro de konstruo de vendejo, la komandantoj kaj batalantoj de la kvina roto de iu trupo tie garnizonanta, iniciative prenis sur sin la taskon. Ĝiaj kadroj gvidis la soldatojn en farado de adoboj, varbretaroj, pordoj kaj fenestroj kaj ili rapide starigis vendejon. Tie la paŝtistoj povas aĉeti ne nur industriajn produktaĵojn transportitajn el Shanghai (Ŝanhajo) kaj Beijing (Pekino), sed ankaŭ lanajn litkovrilojn, feltajn botojn kaj aliajn

vivbezonaĵojn kun nacieca koloro. Krome, la vendejo prenis sur sin ankaŭ la taskon aĉeti lokajn produktaĵojn. En la sezono por tondi ŝafon, la ĝojaj paŝtistoj tri- aŭ kvarope ŝarĝas kamelojn per kamel- kaj ŝaf-lano, vendas ĝin al la aĉetejo, kaj poste aĉetas vivbezonaĵojn. Nun multaj paŝtistaj familioj en tiuj vilaĝoj havas biciklon, kudromaŝinon kaj radioricevilon. La gefiloj de la paŝtistoj, antaŭe tute fremdaj al la lernejo, nun vizitas la elementan lernejon de la propra vilaĝo. La nomita komunumo funkciigas ankaŭ mezlernejon. En la pasinteco, la paŝtistoj devis ĉiam peti favoron de dio kaj budhoj, se iliaj familianoj malsaniĝis, sed nun la tieaj kuracistoj povas ĝustatempe ilin helpi. Antaŭe mankis al la paŝtistoj akvo kaj herbo, sed nun ĉiu brigado havas sian fiksitan herbejon.

Ĉiuvespere, el la kortoj de paŝtistoj ofte aŭdiĝas kantado akompanata de ĉevalkapa aŭ kvarkorda



Lernejo por infanoj de paŝtistoj

muzikilo. Unu el la gajaj kantoj sonas jene:

*Kie ekhaltas la fenikso ora,
Tien ĝi portas pacon, feliĉecon.
Por la paŝtistoj la arme' popola
dismetis, en dezerto Ulan-Buh,*

smeraldopecojn.


*Alivestitas la dezert' miljara:
Senfine abundas herboj, ŝafoj kaj
kameloj.
Ĝojon ludas muzikilo ĉevalkapa.
La vivo nia marŝas al prospero.*

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
			32.0	9365
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	32.0	9365
			25.7	11650
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.3	15510
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145



Lingvo, ĉiutaga vivo kaj Esperanto



Chen Yuan (la dekstra)

LINGVO, same kiel aero kaj akvo, estas ne malhavebla por la homa vivo. Sen lingvo la socia vivo de la homaro estas neebla. Kiam la homoj komencis fari socian laboron kaj uzi instrumentojn, lingvo kreiĝis en tiu procedo kaj de la komenco ĝi ludas rolon organizi la socian vivon. Por normala homo, lia ĉiutaga vivo absolute ne povas iri sen lingvo — kaj tiu procedo daŭras de lia eklerno de parolo en la infaneco ĝis lia lasta spiro. Kvankam la surdmutuloj ne povas paroli, tamen en la nunaj sociaj kondiĉoj, ili uzas mangestan lingvon aŭ fingran lingvon, kiuj evidente estas variaĵoj de lingvo aŭ almenaŭ surogatoj de lingvo.

Fermu viajn okulojn kaj pensu, ĉu nia ĉiutaga vivo povus bone iri se estus subite malpermesite uzi lingvon? Certe ne. Ekzemple, ĉu gepatroj povas altabliĝi por matenmanĝo kun serioza mieno, sen eĉ unu vorto, kiam ili vidas siajn gefilojn matene? Ne. Civilizitaj homoj kutimas interŝanĝi saluton je matena renkontiĝo, almenaŭ ili diras la vortojn mil- kaj dekmil-

foje ripetitajn de la homoj dum la tuta vivo, tamen neniam tedajn “bonan matenon!” — tio signifas la komenciĝon de nova tago. “Bonan matenon” en Esperanto estas transskribita el iuj naciaj lingvoj, kompreneble malsamaj naciaj lingvoj havas malsamajn ekvivalentojn (aŭ similajn esprimojn). Tage, kiam iu civilizita homo renkontiĝas kun sia amiko, ili absolute ne povas teni sian buŝon fermita kaj ne paroli, escepte se ili iras dueli. Same kiel francoj, esperantistoj diras “bonan tagon!”. Sed angloj ne. Ili preferas diri anstataŭe “bonan matenon!” kaj “bonan vesperon!”, kaj japanoj uzas alian esprimon tiukaze. Estas plej interese, ke antaŭe (sed ne nun) en Ĉinio oni ofte diris, anstataŭ salutajn vortojn, “Ĉu vi manĝis?” “Jes, kaj vi?”. Kial je renkontiĝo amikoj tiel demandis unu al alia? Ŝajne tiu saluta kutimo ekzistas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj aziaj landoj. Tio havas socian kialon. Iuj sociologoj diris, ke en la malriĉega ekonomia vivo de la longa feŭda socio “manĝo” estis grava afero prizorginda de la homoj

(ordinaraj). Feŭdaj ĉefoj aŭ superaj riĉuloj eble ne uzis “Ĉu vi manĝis?” por peri saluton je renkontiĝo. Ŝajnas al mi, ke en la okcidentaj landoj estas neniu nacia lingvo, kiu uzas esprimon “Ĉu vi manĝis?” por komenci kontakton inter homoj. Se du esperantistoj renkontiĝus sur strato kaj unu el ili dirus “Ĉu vi manĝis?” anstataŭ “bonan tagon”, la alia, mi pensas, certe konsterniĝus kaj ne scius kion diri.

Estas strange, ke en la ĉiutaga vivo oni ripetadas sennombre multfoje la vortojn “bonvolu —”, “dankon”, “pardonon” ktp. sed neniu tediĝas de tio, male, oni sentas malagrablacon pro neuzo de ili.

Kiam oni esprimas al alia peton, postulon, volon kaj deziron, li ĉiam uzas la vorton “bonvolu”. Kaj diversaj naciaj lingvoj havas similajn esprimojn. Se iu donas informon pri peto ne dirante unue la vorton “bonvolu”, oni konsideras lin ne ĝentila, ne respektanta alian, t. e. necivilizita kaj malklera. Kompreneble en multaj kazoj oni

devas aldoni nemalmultajn aliajn vortojn al la vorto “bonvolu”, ekzemple “bonvolu enveni”, “bonvolu sidigi”, “bonvolu enaŭtigi”, “bonvolu trinki” ktp. Kial oni devas unue diri “bonvolu”? Evidente tiu vorto neniom plimultigis la informojn; tio montras, ke krom informoj oni ankoraŭ devas aldoni al lingvo de civilizitaj homoj ion alian — senton, rilaton ktp. inter homoj. Kun tiu aldono la lingvo uzata de vi povas esti nomata lingvo de kleruloj.

“Dankon!” — kiam iu faris al vi bonon aŭ servon kaj vi volas esprimi al li vian ŝaton, laŭdon aŭ emocion, vi nature diras “dankon”. Kiam oni alportas al vi teon, vi diras “dankon”, kiam oni enmanigas al vi la aĉetitan varon pakitan, vi diras “dankon”, kiam oni montras al vi vojon, vi diras “dankon” kaj fininte paroladon vi diras “dankon” al la aŭskultantoj. Oni ne scias, kiom da fojoj la civilizita homo ĉiutage devas diri “dankon”. La parolanto de “dankon” ne sentas ĝenon en tio kaj ankaŭ la aŭskultanto ne tediĝas de tio. Male se oni ne diras “dankon”, vi opinias lin malĝentila, kruda, flegma kaj aroganta. En la despotisma epoko la superuloj (mastroj) ĝenerale ne uzis la vorton “dankon” rilate al la plebanoj (sklavoj). Sed nun modernaj civilizitaj homoj trovis dignon de la homo kaj konsciis egalecon inter homoj (kompreneble estas egaleco vera kaj ankaŭ falsa), kaj tiam aperis nova kunteksto (en la socia lingvistiko tiu vorto signifas konkretajn sociajn cirkonstancojn en uzo de lingvoj), kaj “dankon” fariĝis nemankigebla.

“Pardonon!” — pensu, kiom da fojoj vi diras tiun vorton

ĉiutage! Ĉiam kiam vi ĝenas iun aŭ petas lin fari ion por vi aŭ esprimas vian bedaŭron, vi (se vi estas civilizita homo) neniam povas forgesi diri “pardonon!”. Aŭdinte tion (eĉ se vi diras tiun vorton ne por esprimi vian bedaŭron) oni certe sentos agrablecon pro tio ke vi egale rilatas al li, kaj kun plezuro plenumos vian peton. Tiamaniere la ĉiutaga socia vivo de la homoj povas iri en harmonio.

Post la sesdekaj jaroj la rapida disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj de la mondo ŝrumpigis la terglobon — vi bezonas nur 16 horojn por flugi de Beijing (Pekino) ĝis Parizo per jeto kaj kiom da landoj, kiuj havas malsamajn naciajn lingvojn kaj dialektojn, vi trapasas dum la vojaĝo. Antaŭe oni diris: “Kiel granda kaj ankaŭ kiel malgranda estas la mondo!” Tio estis nur romantika troigo de poeto, sed nun jam fariĝis fakto. Sekve estiĝis nova kunteksto en la ĉiutaga socia vivo de la homaro. Ekzemple, en la sama aviadilo estas pasaĝeroj parolantaj kelkajn aŭ dekelkelkajn malsamajn lingvojn; ekzemple, aviadilo surteriĝas survoje en iu loko, kies lingvo estas nekonata de la pasaĝeroj, kaj tiam se iu ajn pasaĝero volas doni necesan informon, li ne povas ne forlasisian nacian lingvon, eĉ buŝan parolon artikulaciitan — eble esperantistoj opinias, ke en tia kazo plej bone estus uzi Esperanton, se la tuta mondo komprenus tiun lingvon — kaj devas uzi signojn anstataŭ voĉan lingvon. Ekzemple en multaj internaciaj flughavenoj vi vidas, ke sur montrotabuloj troviĝas anstataŭ vortoj nur desegno de forko aŭ vaporanta taso en telero. Tiu signo diras al vi: Jen restorcio, trinku teon aŭ kafon kaj

manĝu se vi malsatas, ktp. En publikaj lokoj oni pli kaj pli multe uzas pazigrafiajn signojn por esprimi plej necesajn informojn, kio povas estigi plej rapidan efikon. Tio ne signifas, ke lingvo estas sentaŭga en la ĉiutaga vivo, sed montras nur, ke en la nova kunteksto kreita pro la novaj sciencoj kaj teknikoj buŝa parolo artikulaciita aŭ skriba lingvo iatempe nepre devas peti helpon de siaj anstataŭantoj (en telekomuniko oni uzas morson por anstataŭi lingvon), kaj tiuj signoj rekte liveras informon al la unua signala sistemo de la homa cerbo kaj efektive ili ludas rolon de lingvo.

Ĝuste pro tio ke la internacia kontakto (interŝanĝo de informoj) fariĝis pli ofta, pli intima kaj pli urĝa ol iam ajn antaŭe, kaj kvankam signoj estas vaste uzataj, tamen por solvi sisteman interŝanĝon de informoj oni ne povas ne uzi “helpan lingvon”. Lastatempe eĉ lingvistikaj rondoj senĉese prezentis demandojn pri “helpa lingvo”, inter kiuj kelkaj rekte proponis preni la anglan lingvon kiel “helpan lingvon” (kompreneble tiu propono renkontas oponon de nacioj neuzantaj la anglan lingvon). Eĉ profesoro J. H. Greenberg, unu el la nunaj plej famaj usonaj lingvistoj, diris en sia lastatempa verko, ke Esperanto kiel “helpa lingvo” jam atingis “limigitan sukceson”. Tio sendube estas kuraĝigo por esperantistoj. Tiu profesoro opinias, ke kun senĉesa disvolviĝo de la ekonomia kaj kultura vivo de la mondo nepre aperos fine “unika mondlingvo”, kompreneble tiu mondlingvo estos efektivegebla post tre tre longa tempo eĉ nekalkulebla kaj eble

El Miaj Rememoroj



Zhou Zhuangping

EN 1929, kiam mi lernis en la Tokia Medicina Kolegio de Japanio, mi kutimis viziti librejojn ĉe Ĝinbo-strato de Kanda-distrikto ĉiusabate.

Foje mi trovis iun gazeton kun la vorto "Esperanto" sur la verda kovrilo. La nekonata lingvo vekis mian atenton. Dank' al miaj scioj pri fremdaj lingvoj, mi povis konstati, ke ĝi ne estas la lingvo germana, angla aŭ franca. Kun granda scivolemo mi unuspire ĝin trafolumis. El la klarigo en la japana lingvo mi sciigis, ke Esperanto estas lingvo kreita de la pola okulisto L. L. Zamenhof, kaj helpate de ĝi oni povas fari internacian korespondadon. Mi plie vizitis librejojn por serĉi lernomaterialojn pri Esperanto.

Mi vere ŝuldis multajn dancojn al japanaj esperantistoj kaj eldonistoj, kiuj liveris al legantoj nemalmultajn Esperantajn gazetojn, memlernajn librojn kaj diversajn vortarojn. Mi aĉetis Esperantan memlernolibron de Akita Uĝaku kaj referencajn librojn. Iom leginte ilin, mi plie sciigis, ke la gramatiko de Esperanto estas sufiĉe racia kaj ĝi havas konsiderinde multajn vortojn, kies radikoj estas tiaj samaj kiel en la angla, franca kaj germana lingvoj. Tio konvinkis min ke ellerni Esperanton estas ne malfacile. De la sekvanta tago mi persistadis ĝin lerni dum almenaŭ duonhora ĉiutage. Post trimonata lernado mi jam posedis ĝiajn tutan gramatikon kaj multajn vortojn.

Tiam estis tre oportune lerni fremdajn lingvojn en Japanio. Tie troviĝis multaj eldonaĵoj por lerni iun ajn fremdan lingvon, inkluzive Esperanton. En tia medio mi komencis memlerni Esperanton kaj en ĉ. du jaroj akiris la sukceson deziratan en la komenco. Eĉ hodiaŭ post 50 jaroj, kiam mi rememoras tion, mi ankoraŭ havas grandan respekton kaj sopiron al tio, kaj dankas japanajn esperantistojn kaj eldonistojn, ke ili pretigis por mi bonajn kondiĉojn en lernado de Esperanto.

En printempo de 1933, kiam malboniĝis la rilato inter Ĉinio kaj Japanio, mi devis reveni de Tokio al Beijing (Pekino). Post la reveno al la patrolando mi ĝoje vidis, ke vikle antaŭenmar-

ĝi ne estos Esperanto — pri tiu demando oni povas diskuti kaj atendi disvolviĝon de la praktiko. Sed antaŭ ni prezentiĝas la fakto: 1, kun disvolviĝo de la ĉiutaga socia vivo internacia la homaro urĝe bezonas "helpan lingvon" krom pazigrafiaj signoj; 2, la sukceso (eĉ limigita) de Esperanto jam vekis atenton

de la socia publiko; 3, la demando (lasta, sed ne plej malgrava) ĉu Esperanto povos esti rekonata kiel "helpa lingvo" kaj fari ankoraŭ pli grandan kontribuon por la homaro estas pripensinda por ni esperantistoj.

* La aŭtoro estas membro de la Konsilantaro de la Ĉina Filologia

Asocio, vicprezidanto de ĈEL kaj lingvosciencia konsilanto de la kompilata "Granda Vortaro de la Ĉina Lingvo" (en almenaŭ dek volumoj). Li verkis la librojn "Lingvo kaj Socia Vivo" (eldonita en 1979 kaj reeldonita en 1980), "Enkonduko de Socia Lingvistiko" (en presado) k.a. Tiu ĉi artikolo estas parto de parolado pri populara lingvoscienco farita de li lastatempe.

ŝis ankaŭ la Esperanto-movado de nia lando. En multaj grandaj urboj fondiĝis Esperantaj organizaĵoj kaj ĉiam pli multiĝis la lernantoj. Tamen, kompare kun Japanio, Ĉinio havis tre malmulte da Esperantaj eldonaĵoj, ekz., la nombro de referencaj libroj estis kompatinde malgranda. Pro tio mi havis fortan deziron kontribui al la Esperanto-movado kaj decidis kompili vortaron urĝe bezonatan por komencantoj. Dank' al vortaroj angla-Esperanta kaj japana-Esperanta kunportitaj el Japanio, mi kompilis la "Vortareto Esperanto-Ĥina" (Ĥina=Ĉina) en unu jaro, kaj ĝin poste eldonis Kaiminglibrejo, Shanghai (Ŝanhajo). Kvankam ĝi havis ne tre multajn vortojn, la klarigoj estis ne kompletaj kaj la eraroj en ĝi nemalmultaj, tamen ĝi ludis aktivan rolon siatempe kaj ankaŭ en la postaj jaroj. Mi ne estis fakulo pri tiu afero kaj havis ne altan nivelon de Esperanto. Kial mi kuraĝis tion fari? Ĉar la vigleco de la japana Esperanto-movado donis al mi grandan edifon kaj inspiron.

En printempo de 1934 mi venis al Shanghai kaj faris iujn laborojn por la ĵus fondita Shanghai-a Esperantista Ligo. Ĝi instalas Esperanto-kursojn tagan kaj vesperan, kaj krome, Esperantajn librejon kaj korespondan lernejon. Ĝi aperigis kelkajn propagandajn Esperantajn revuojn unu post alia. En tiuj jaroj mi unuflanke plenumis instruadon en la kursoj kaj aliflanke faris internacian korespondon. Tiam mi korespondis kun esperantistoj de 17 landoj. Iliaj enhavoriĉaj entuziasmaj leteroj kaj la interŝanĝitaj diverslandaj legaĵoj multe min kuraĝigis. Parto de

tiuj materialoj estis kompilita kaj eldonita en la duvoluma kolekto de Internaciaj Esperantaj Leteroj.

Ĉiam pli urĝe bezonataj estis Esperantaj legaĵoj kaj referencaj libroj pro senĉesa disvolviĝo de Esperanto-movado en diversaj lokoj de Ĉinio. Sub tia ĝojinda situacio mi konsiliĝis kun s-roj Jaziko kaj Kroji kaj decidis kompili la "Modernan Ĉinan-Esperantan Vortaron" por kontentigi komencantojn. Tiam mankis al ni sufiĉe da referencaĵoj. Ni eklaboris nur bazite sur tio, ke ĉiu el ni povosciis unu fremdan lingvon kaj ni povis disponi materialojn akiritajn per korespondado. Tiamaniere ni finis nian kompiladon post unu jaro kaj duono. Sed tiam eldonistoj de Shanghai opiniis, ke eldono de ĝi estis senprofita, kaj rifuzis eldonon de tiu vortaro. Sub tiu malfavora stato ni devis mem fari tion kaj presis

500 ekzemplerojn. Sed, ĝuste kiam ni estis pretaj ilin vendi, eksplodis milito. Tiuj vortaroj estis deponitaj en mia loĝejo kaj ruiniĝis tute de kanonado. Depost tiam mi forlasis la Esperanto-movadon kaj partoprenis en la kontraŭjapana kaj nacisava laboro.

Hodiaŭ kiam mi rememoras tiun historian fragmenton en la tridekaj jaroj, mi falis en profundan pensadon. El mia propra travivaĵo mi trovis, ke la Esperanto-movado de nia lando disvolviĝis ĉiam en ekstreme malfacilaj cirkonstancoj. Post la Liberiĝo la movado iris ankaŭ zigzage, kaj hodiaŭ firma bazo estas metita post tiu procedo. Kvankam mi estas maljuna, tamen mi havas plenan fidon pri la bela perspektivo. Mi kredas, ke la Esperanto-movado de Ĉinio certe atingos pli grandajn sukcesojn en la moderniga konstruado de nia lando.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



- 1 Tianjin
- 2 Songshan

Pri la Internacia Esperanto-Muzeo

EN la jaro 1927, okaze de la 19-a UK en Danzig, en kunveno de la delegitoj de la landaj organizoj, Felix Zamenhof, frato de nia majstro, faris proponon establi Internacian Esperanto-Bibliotekon, celebre al la 50-jara jubileo de Esperanto (1937). Aŭstria kortega konsilisto Hugo Steiner ekkaptis la ideon, por ĝin efektiviĝi tuj. Reveninte hejmen li hazarde trovis komprenemon ĉe la tiama kanceliero.

Tiam en Wien estis granda manko je loĝejoj, tial la naskiĝloko de la biblioteko sub la nomo "Internacia Esperanto-Muzeo en Wien" (IEMW) estis iama ĉevalejo kun prunteprenitaj tablo kaj du seĝoj. Du volontuloj-helpantoj estis la unuaj kunlaborantoj. Ĉar la disponebla loko jam en 1928 fariĝis tro malgranda, Steiner, kiu estis turmentata ankaŭ per la zorgo, de kie preni monrimedojn por fruktodona pluevoluado, provis aligi la Muzeon al la Nacia Biblioteko kaj sukcesis. La 30-an de sept. 1928 la kontrakto inter la Nacia Biblioteko kaj la asocio "Internacia Esperanto-Muzeo en Wien" estis subskribita. La 1-an de aŭgusto 1929, federacia prezidanto W. Miklas deklaris en Esp. la inaŭguron de IEMW.


Tamen ĝis 1949 la kunlaborantoj devis esti pagataj el la kotizoj kaj mondonacoj de la membroj de la Muzea Asocio.

Nur en 1930 Steiner povis translokigi la Muzeon en grandan salonon de "Neue Burg" (parto de la imperiestra kastelo "Hofburg"), al kiu en 1936 venis granda salono (20 × 11 m.). Ekde la 1-a de julio 1930

restis ĝis nun, preskaŭ senescepte donacoj flanke de la esperantistaro, inter ili tre imponaj. En la lastaj jaroj heredigis kelkaj esperantistoj, interalie D-ro E. Wüster, siajn valorajn privatajn bibliotekojn al IEMW. Ankaŭ speciala muzematerialo venis multnombro.

En 1938 la nazi-reĝimo fermis la Muzeon kaj Steiner estis "ŝirm"-arestita dum 3 monatoj. Ree libera Steiner iris al la komisara gvidanto de Nacia Biblioteko por informiĝi pri la sorto de IEMW. La komisaro promesis, ke nenio estos pereigata, sed malpermesis uzi la deponatan materialon.


1945 — la liberighoro venis! En tiu jaro, la rusa armeo okupis la ejojn de la Muzeo en "Neue Burg", IEMW ricevis helpe de kanceliero inĝ. Leopold Figi kvin salonegojn en Hofburg (Michaelertrakt). Ĉar la ejoj estis en malbona stato, necesaj renoviglaboroj daŭris ĝis la komenco de 1947. Per malmultaj helpantoj, inter kiuj depost 1947 ankaŭ la vidvino de s-ano Weber, kiu mortis en la koncentrejo Mauthausen, la tuta muzea materialo (preskaŭ tute sen manko) devis esti portata



Hugo Steiner, la fondinto de IEMW

du kunlaborantoj regule laboris en la nova hejmo. La libroj kaj aliaj presaĵoj akiritaj estis, kiel

“Panteono” de
IEMW



147 ŝtupojn supren en la novajn ejojn. Ankaŭ meblaro mankis, kaj la estro de la ŝtata meblo-deponejo, registara konsilisto Pfund, helpis en vastanima maniero. De oktobro 1949 subvencioj estis donataj flanke de la Ministerio pri Instruaferoj. Nun oni ekordigis la materialon. Depost 1957 laboris en la Muzeo du sekretariinoj (Weber kaj Vasta) kiuj ricevis modestan salajron de la ministerio.

En 1957 Steiner eldonis katalogon pri la Esperanto-literaturo en IEMW, kaj en 1958 la duan volumon pri la aliaj sistemoj kaj provoj de internacia lingvo ambaŭ laŭ la internacia dekuma klasifiko.

En 1958 Steiner fine sukcesis ricevi por la Muzeo laŭnorman postenon de la grupo “B” (oficisto kun matura ekzameno), kiu en 1960 estis ŝanĝita al la grupo “A” (oficisto kun akademia grado), kiun nun mi depost oktobro 1958 (post grava operacio en aŭgusto 1969 Steiner transdonis al mi ankaŭ la gvida-

don de la Muzeo) okupas. Ekde julio 1966 estas en la Muzeo ankaŭ nova posteno “B” (mia kunlaboranto ofic. kons. H. Marz).

En siaj lastaj vivojaroj Steiner pretigis alfabetan katalogon pri la tuta literaturo en la posedo de IEMW. La 1-an de aŭgusto 1969 mortis Steiner en sia 92-a jaro.

La multspeca kaj ege ampleksa laboro en IEMW estas nun en la manoj de nur du oficistoj. Ili devis aranĝi ekspoziciojn, instali film-arhivon, eldoni katalogon. Estas menciinde, ke ekde 1970 preskaŭ en ĉiu jaro en la Muzeo estis vizitebla malgranda speciala ekspozicio.

Krom la librokatalogoj kaj slipkatalogoj, ordigitaj laŭ aŭtoroj kaj titoloj, ekzistas nun ankaŭ laŭtema slipkatalogo pri la literaturo akirita ekde 1970. Tiel ni klopodas pri ĉiam pli bona malfermo de niaj havaĵoj al la bono de la interlingvistiko kaj en la servo por niaj legantoj en la tuta Eŭropo, kiuj havas la

eblecon pruntepreni literaturon el IEMW per la Aŭstria Nacia Biblioteko. Nia biblioteko nun havas 17,700 volumojn (la nombro inkluzivas ankaŭ la binditajn gazet-jarkolektojn, ne unuopajn gazetnumerojn), 1,100 manuskriptojn kaj aŭtografiojn, 300 muziknotojn, 200 diskojn kaj sonbendojn, 8,200 fotojn, 8,600 gazeteldonaĵojn, 800 afiŝojn, 1,100 muzeajn objektojn kaj 3,800 vinjetojn. 34,000 maldikaj presajoj estas aparte pritraktataj kaj konsistas el prospektoj, varb- kaj kongresmaterialoj, vidaĵkartoj ktp.

Ni posedas ĉirkaŭ 300 librojn kaj broŝurojn el Ĉinio, precipe el la jaroj post 1950. Nature ni posedas la kompletajn jarkolektojn de “El Popola Ĉinio” kaj eĉ tre malnovajn gazetojn, ekzemple “La Voĉo de la Popolo”, Shanghai, 1913. Plue ni ricevis 8 diversajn bildpoŝt-kartseriojn kaj dum kelkaj jaroj regule la grandajn kaj belegajn murkalendarojn. Precipe la libroj pri la ĉina pentroarto kaj aliaj artaĵoj ĝojigas nin pro la artnivela realigo.


NOVA DISVOLVIĜO DE E-MOVADO DE ĈINIO

En 1980 E-movado de Ĉinio havis kompare grandan disvolviĝon. En tiu ĉi jaro fondiĝis Esperanto-asocioj en la provincoj Hunan kaj Anhui kaj en la urboj Chongqing, Wuhan, Bengbu, Xi'an kaj Huainan, Esperantologia Instituto en la provinco Jilin kaj preparaj grupoj de Esperanto-asocioj en aliaj 15 provincoj kaj urboj.


40 urboj funkciigis Esperanto-kursojn, en kiuj lernis pli ol dekmil personoj. Kaj krome, 5 altaj lernejoj prenis Esperanton kiel nedevigan studobjekton, 10 altaj lernejoj starigis Esperanto-kursojn. Pli ol dudek mil personoj lernas Esperanton en la koresponda lernejo.

La ĉina gazetaro raportis pri la Esperantaj aktivecoj. Laŭ nekompleta statistiko, 80 gazetoj kaj ĵurnaloj, 26 radiostacioj kaj televiziaj stacioj 340-foje konigis al la publiko Esperanton aŭ raportis pri aktivecoj de diverslokaj Esperantaj organizoj.

Esperantistoj de Chongqing kunvenas en parko por celebri la naskiĝtagon de Zamenhof.



Nanning-a Esperanto-kurso



La infana Esperanto-kurso de la Fengyanglu-a Elementa Lernejo de Shanghai kaj iliaj ĝeinstruistoj

ZAMENHOF-FESTO EN ĈINIO

La 15-a de decembro 1980 estis la 121-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Por celebri tiun ĉi feston ĉinaj esperantistoj faris multajn memorigajn aktivecojn.

Beijing-aj esperantistoj okazigis kunvenon en la Kultura Palaco de Laboruloj de Beijing. Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris raporton "Zamenhof kaj Esperanto". Zen Hojaŭ, vicestro de la prepara grupo de la Pekina Esperanto-Asocio, parolis pri la Esperantaj aktivadoj en Beijing (Pekino) en la lasta jaro.

Pli ol mil esperantistoj de Huang-

shi, la dua granda urbo de Hubei-provinco, okazigis Zamenhof-festajn kunsidon. Membroj de Esperanto-kurso kantis solojn, prezentis dialogojn kaj deklamis poemojn en Esperanto.

Esperantistoj de la urbo Chongqing okazigis kunvenon en la parko Eling, en kiu respondeculo de la postlabora oficista kaj laborista lernejo de la Chongqing-a centra distrikto premiis elstarajn membrojn de Esperanto-kurso.

Ankaŭ Lanzhou, kie Esperanta movado silentis pasinte, okazigis raportkunvenon. Antaŭ la kunveno eksponiĝis kaj vendiĝis Esperantaj libroj kaj insignoj.

Projektado de virinaj vestoj

Fotoj de REN REN

Veterana kaj junaj vestoprojektistoj




Estas ĉina popoldiro "Budha statuo sin beligas per oro, kaj homo — vestoj". De antikveco la ĉinaj virinoj jam donis atenton al vestado, kaj ĝuste pro tio la ĉina silka industrio ricevis grandan disvolviĝon jam antaŭ longe.

Kun la progreso de la epoko kaj la disvolviĝo de la materia civilizacio, la vestado ludas pli kaj pli grandan rolon por riĉigi la vivon de la popolo kaj levi ĝian kulturen nivelon.

Kun la disvolviĝo de la ekonomia konstruado kaj la kultura afero, la ĉinaj virinoj postulas modajn vestojn el ŝtofoj brilkoloraj, multspecaj kaj bonkvalitaj. Pro tio la vestoprojektistoj klopodas por projekti kaj tajlori multspecajn modajn vestojn, pli belajn kaj pli riĉajn je nacia gusto por kontentigi la bezonon de la virinoj.



Montrofenestro de butikoj de modaj vestoj



Projektado de nova vesto

◀ Novaj verkoj de projektistoj ▼





Laborejo de iu vestofarejo

Ekspozicio de modaj vestoj



Tigrino de
nordorienta
Ĉinio naskis
kvin
idojn jare

Bone kreskas la kvar idoj (tri maskloj kaj unu femalo), la duenaskitoj de la sama tigrino en la lasta oktobro.

Femala ido, la unuenaskito de la tigrino en la lasta junio, estas trejnata en akrobata trupo.




Kaj krome similajn aktivecojn faris ankaŭ Suzhou, Hangzhou, Xi'an, Dushan kaj aliaj urboj.

LA TOMBO DE VERDA MAJO TROVITA

La tombo de la fama esperantistino Verda Majo, kiu dediĉis sin al la ĉina naciliberiga afero, estis trovita en la Jiamusi-a Martira Tombejo.

Verda Majo mortis de malsano en 1947 kaj estis entombigita en la urbo Jiamusi de la provinco Heilongjiang en nordorienta Ĉinio. Pro translokiĝo ŝia tombo estis perdita. Dum multaj jaroj la koncernaj institucioj plurfoje serĉis, sed malsukcesis. En majo de la lasta jaro la departemento de historiaj objektoj de Jiamusi organizis esploran grupon por serĉi ĝin kaj fine trovis ĝin en la dua tagdeko de aŭgusto. Dum esplorado la grupo kolektis librojn, stampilon, skribilaron, tekon kaj vivbezonaĵojn uzitajn de ŝi. Nun la popola registaro de Jiamusi konstruigos tombon kaj memorŝtonon en pitoreskejo, por memorigi tiun ĉi internacian batalantinon.

Liu Wei antaŭ la tombo de sia bofratino Verda Majo



Zamenhof-festo en Beijing

ELDONIĜIS LA UNUA NUMERO DE "NOVA ESPERO"

Ĝi estis redaktita kaj eldonita de la Hubei-a Esperanto-Ligo kaj la fremdlingva fakultato de la Centroĉinia Normala Instituto en decembro de 1980. "Nova Espero" estas sinteza periodaĵo en la han-a lingvo kaj Esperanto. Ĝi aperas trimonate kaj la formato estas 18 × 26 cm. Ĝi enhavas artikolojn pri internaciaj lingvoj kaj Esperanto kaj rubrikojn "Esperanta Studo", "Literauro", "Historio de la E-movado" kaj "Kantoj".

MEMORE AL ELTUNKO

La 7-an de decembro 1980, pli ol cent esperantistoj de Chengdu, ĉefurbo de Sichuan-provinco, kunvenis en la martira tombejo de la urbo okaze de la 31-a datreveno de la martiriĝo de la fama esperantisto Eltunko.

La aktivadon prezidis Liu Hongkang, prezidanto de la Chengdu-a Esperanto-Asocio. Oni raportis pri lia batalo kontraŭ Kuomintangaj reakciuloj kaj pri liaj Esperantaj laboroj. La nomita asocio aperigis kolekton da artikoloj por lin memorigi.

KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO

La unua eldono de "Kiu Estas Kiu en Scienco kaj Tekniko" entenas

faktojn pri 200-250 sciencistoj-teknikistoj, kiuj pli malpli iel laboras en, kun aŭ per Esperanto.

Pri ĉiu persono ĝi liveras informojn pri la persona kaj profesia situacio kaj la liston de liaj aŭ ŝiaj plej gravaj verkoj kaj publikigaĵoj naci- kaj Esperant-lingvaj.

La aperigo de la libro estis difinita por iu tempo antaŭ la fino de la jaro 1980. Ĝi kostos ĉ. 24 germanajn markojn aŭ egalvaloron, kaj estas mendebla ĉe Eldonejo Angulista, Georgo D. Winkler, Jagerstrasse 27, D-4200 Oberhausen 11, FRG aŭ ĉe la kompilanto Christian Darbellay, Jostenallee 45, D-4040 Neuss 1, FRG.

Atentigo: Se vi estas Esperanto-uzanta sciencisto/teknikisto aŭ havas amikojn, kiuj estas tiaj, bonvolu, se vi/ili ŝatus eniri la venontajn eldonojn de la libro, peti informojn kaj enketilon ĉe la kompilanto.

ESPERANTO UZITA EN NORVEGA HORARLIBRO

La signoklarigoj en la Norvega Horarlibro — la plej legata kaj uzata libro por norvegoj en somertempo — troviĝas ankaŭ en Esperanto. Tio rezultis el tio, ke la ĉefestraro de NSB — Norvega Ŝtata Fervojo — morale kaj ekonomie rigardas la Esperanto-movadon kun simpatio.

La Ĉina Virina Federacio kaj ĝiaj taskoj

— Intervjuo kun Huang Ganying, vicprezidantino de la Ĉina Virina Federacio

La Ĉina Virina Federacio (ĈVF) travivis jam 31 jarojn. Iuj el niaj legantoj letere demandis nin kia organizo ĝi estas, kiajn taskojn ĝi portas sur si kaj kian socian pozicion havas la ĉinaj virinoj. Por tio nia raportisto intervjuis Huang Ganying.

La Red.

Raportisto: Konigu al mi, mi petas, kia virina organizo estas ĈVF.

Huang: Ĝi estas virina organizo de la tuta Ĉinio, kies ĉefa tasko celas protekti la interesojn

de la ĉinaj virinoj. La federacio naskiĝis en la Unua Tutlanda Virina Kongreso okazinta en Beiping (Pekino) en marto de 1949, antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Poste, starigitaj estis la virinaj organizoj de diversaj niveloj kaj ankaŭ la virina kongreso ĉe la baza nivelo de la urboj kaj kamparo.

Raportisto: Ĉu vi povas paroli al mi pri la gvid-organo de ĈVF kaj ĝiaj gvidantoj?

Huang: La Tutlanda Virina Kongreso estas la plej alta organo de potenco de ĈVF. Ĝi okazas en ĉiu kvina jaro. Ĝia plenuma komitato estas la plej alta organo de potenco dum la periodo post kiam la Tutlanda Virina Kongreso estas fermata. Song Qingling, Cai Chang kaj Deng Yingchao estas la honoraj prezidantinoj de ĈVF, Kang Keqing estas ĝia prezidantino, kaj ĝi havas 13 vicprezidantinojn kaj 50 konstantajn komitatanojn. La sekretariaro sub la Konstanta Komitato de ĈVF gvidas ĝiajn ĝeneralajn aferojn, kaj sub ĝi estas departementoj de internaciaj rilatoj, de enlanda laboro kaj aliaj. ĈVF eldonas la gazeton "Ĉinaj Virinoj" en la ĉina kaj angla lingvoj. Ĝi havas

Honoraj prezidantinoj de ĈVF Cai Chang (la maldekstra) kaj Deng Yingchao (la meza) kaj prezidantino de ĈVF Kang Keqing



lernejon por kulturaj virinaj kadroj.


Raportisto: Bonvolu prepari la taskojn de la Ĉina Virina Federacio.

Huang: Ĝiaj ĉefaj taskoj estas mobilizi la virinojn, ke ili faru novan kontribuon por la moderniga konstruado. Konkrete dirite, ĝi devas zorgi pri la interesoj propraj al la virinoj, akceli la socian bonstatigan aferon kaj socialigi paŝon post paŝo la hejmajn laborojn, por ke la oficistinoj, laboristinoj kaj komunumaninoj liberiĝu de pezaj mastrumadoj; zorgi pri la kreskado de la infanoj, geknaboj kaj gejunuloj kaj tutkore kulturaj ilin en revoluciajn daŭrigantojn disvolviĝantajn morale, intelektaj kaj korpe; instrui la virinojn ĝuste trakti per la socialisma ideologio amon, geedziĝon kaj familian kaj starigi la socialisman moralon; kaj disvolvi amikajn rilatojn kun alilandaj virinoj kaj virinaj organizoj por akceli interkompreniĝon kaj amikecon.

Raportisto: Kiajn novajn rimedojn la federacio alprenis lasttempe por defendi la proprajn interesojn de la virinoj?

Huang: La federacio apelaciis al koncernaj departementoj de la registaro, ke ili atentu la problemojn pri dungigo de urbaj junulinoj, pri egala pago por egala laboro al la kamparaj viroj kaj virinoj, pri infanvartejoj kaj infanĝardenoj, pri pezaj mastrumadoj de laboristinoj, pri diskriminacio kaj turmentado kontraŭ virinoj, pri geedziĝo preni virinojn kiel komercaĵojn, kaj pri malalta proporcio de virinaj kadroj. Ekzemple, la junulinoj konsistigas plejparton de la senlaboraj gejunuloj,

Je la 8-a de marto 1980 honora prezidantino de la Ĉina Virina Federacio Song Qingling kaj fremdlandaj gastoj ĉeestis amuzkunvenon okazigitan de ĈVF.



loj, iuj proponis ke plimulto de la virinoj mastrumu siajn hejmlaborojn, por ke pli da junuloj ricevu laboron, kaj tia propono aplikiĝis jam en iuj lokoj. ĈVF trovis la aranĝon malkonvena kaj prezentis raporton pri tio al la sekretario de CK de KPC. En la kunveno pri dungigo de la tutlandaj urbaj gejunuloj okazinta en la lasta aŭgusto, la sekretario de CK de KPC speciale diskutis pri tiu problemoj kaj montris en la dokumento de la kunveno sian aprobon pri la opinio de ĈVF. Vicĉefministro Wan Li diris: "Estas necese doni sufiĉan atenton al dungigo de virinoj kaj praktiki la principon de egalrajteco de la viroj kaj virinoj kaj egala pago por egala laboro al ili. Necesas disvolvi la talenton de virinoj kaj atente protekti laborantajn virinojn."

ĈVF devas preni la supredirektajn aferojn kiel sian ĉefan laboron en la estonteco, ke la federacio fariĝu "patrina hejmo" de la virinoj.

Raportisto: Kio ĉagrenas la ĉinajn virinojn?

Huang: Ke iliaj hejmaj laboroj estas tre multaj kaj pezaj, tio estas evidenta. Nun plejparto de la urbaj kaj kamparaj virinoj havas okupon. Ĝenerale, la geedzoj de ĉiu familio kune plenumas la hejmajn laborojn, sed ĉiutage la edzino elspezas pli da tempo por la mastrumado, kiel aĉeto de manĝaĵoj, preparo de manĝo, lavo de vestoj kaj eduko de infanoj. Kvankam la registaro alvokadis, ke ĉiu geedza paro havu nur unu infanon, tamen tiaj familioj restas ja malmultaj. En la kamparo la virinoj devas kultivi la hejman privatan parcelon kaj fari flankokupon. Niaj Partio kaj registaro jam atentis tiun problemon kaj klopodas por disvolvi sociajn servojn, ekzemple, en la urboj establi servojn por ĉiutaga vivo, vendejojn kaj manĝejojn, infanvartejojn, infanĝardenojn ktp. En la kamparo estis starigitaj grupoj de tajloroj kaj ŝuistoj, kaj en la agrikulturo



Kunsido de dommastrinoj en iu loĝkvartalo de Shanghai

raj laborplenaj periodoj oni starigis publikajn manĝejojn kaj portempajn infanvartejojn en multaj lokoj. Tiuj servoj simplaj postulis malmultan pagon kaj faciligis la vivon de la popolo.

Raportisto: Ĉu ekzistas neegaleco inter la viroj kaj virinoj kaj diferencoj inter la urbaj kaj kamparaj virinoj?

Huang: La konstitucio de nia lando kondiĉas, ke la virinoj ĝuas egalrajtecon kiel la viroj en politiko, ekonomio, socio, familio kaj aliaj flankoj. Nia registaro ne nur difinis tion en la leĝo, sed ankaŭ ellaboris multajn konkretajn politikojn kaj rimedojn por efektivi tiun egalrajtecon. En la 30 jaroj post la Liberiĝo la egalaj rajtoj de la virinoj estis realigitaj ĝenerale. Sed nun ankoraŭ ekzistas la postĝinta feŭdisma ideologio — respekto al la viroj kaj males-timo al la virinoj, de tempo al tempo okazas tretado de leĝaj rajtoj de la virinoj kaj krimo kontraŭ ili. Kiel reprezentanto kaj protektanto de la virinaj interesoj, la federacio rajtas supervidi la registaron en ĝia

efektivigo de la leĝo, por protekti la leĝajn rajtojn de la virinoj.

Pro la malekvilibra disvolviĝo de la ĉina ekonomio, ekzistas diferencoj de la sociaj pozicioj kaj bonstatoj inter la urbaj kaj kamparaj virinoj. Ekzemple, en la urboj la sociaj servoj estas pli multaj kaj la nivelo de la vivo estas iom pli alta; dum en la kamparo la virinoj devas ŝarĝi sin per sufiĉe peza mastrumado kaj laboroj de agrikultura kaj flankokupa produktado kaj la feŭdaj kaj tradiciaj moroj havas pli multan influon. Precipe en la izolitaj vilaĝoj de tempo al tempo okazas tia geedziĝo, en kiu oni prenas virinojn kiel komercaĵon.

Raportisto: Mi volus fari ankoraŭ unu demandon. Ĉu en nia lando troviĝas prostituitinoj kaj needzinigitaj patrinoj? Se jes, kial?

Huang: Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la popola registaro fermis ĉiujn bordelojn postlasitajn de la malnova Ĉinio. Samtempe kun tio, ĝi donis sumon da mono por

kuraci la malsanojn de la prostituitinoj, havigis al ili laboron aŭ sendis ilin al ilia hejmloko laŭ ilia volo. De tiam la prostituado en Ĉinio estis eliminata.

Antaŭ kelkaj jaroj tre malmultaj junulinoj kaŝe sin prostituis pro strebado al materia ĝuado. Samtempe kun disvolviĝo de ekonomio, la popola registaro faris klopodon, por ke pli da junulinoj havu okupon. Nun la registaro alprenas efikajn rimedojn por malpermesi prostituadon.

Ĉar malmultaj junulinoj sin montris frivolaj en sia am-rilato, ili gravediĝis antaŭ la edziniĝo. Generale post tio, ili iris al hospitalo por abortigo. Tre malmultaj el ili volas varti sian infanon. Ankaŭ iliaj infanoj estas senescepte protektataj de la nova Geedziĝa Leĝo. Sed tia gravediĝo estas ofte riproĉata de la publika opinio.

Raportisto: Dankon pro via konigo al niaj legantoj pri la laboro de la Ĉina Virina Federacio kaj pri la ĉinaj virinoj.

Huang: Tio estas nia devo. Ni petas vin transdoni bondeziron de la ĉinaj virinoj al diverslandaj fratinoj.





Bao Guifang (la meza) kaj ŝiaj gestudentoj

"Najtingalo" kaj ŝiaj gestudentoj

de FU XIPENG

EN koncerto okazigita en Beijing (Pekino) 6 gejunuloj prezentis kantojn cirkulantajn en Ĉinio kiel ekz. "Paŝtado de Frato Wuge", "Lulkanto" ktp., kaj ankaŭ malfacilajn kantojn el mondfamaj operoj kiel ekz. "Sinjorino Papilio", "La Traviata" ktp. La belaj kantoj ricevis laŭdegojn de muzikistoj el pli ol 20 provincoj kaj municipoj.

Tiuj 6 gejunuloj estis membroj de la instrua grupo de voĉa muziko gvidata de Bao Guifang de la Jilin-provinca Operejo. Ili ne vizitis konservatorion, sed estis elkulturitaj de instruistino Bao Guifang en la lastaj 2 jaroj.

Bao Guifang estas fama ĉina kantistino de koloratura soprano. En 1959 ŝi lernis en la Sofia Konservatorio de Bulgario. Sub la direktado de profesoro pri voĉa muziko Ĉurki Ĉerkin kaj asistanta instruistino

Dora Mudafva, ŝi fariĝis elstara lernantino de la esplora grupo de tiu konservatorio. En koncertoj de Sofio, Helsinko kaj Vieno ŝi kantis la famajn kantojn "Ario de Lucia", "Ario de Rozina" ktp. kaj estis honore titolita de eŭropaj voĉmuzikistoj per "ĉina najtingalo". Post kiam Bao Guifang revenis al Ĉinio, ŝi aktivadis kiel unu el la plej bonaj kantistoj de Ĉinio. Tamen ŝi ne kontentiĝis je siaj sukcesoj atingitaj kaj penadis kontribui sian forton por starigi ĉinan nacian voĉmuzikan skolon.

Subtenate de koncerna ŝtata institucio, Bao Guifang organizis en 1978 voĉmuzikan instruan grupon. Ŝi persone elektis studentojn el la partoprenantoj de konkurso de solokantado, mem difinis la studobjekton kaj lernotempon kaj laboris kiel ĝia instruistino. En la nunaj 8 gestudentoj, iuj estis elektitaj el bazaj ensembloj, aliaj antaŭe

estis voĉmuzikaj amatoroj, triaj estis malsukcesintoj en ekzameno por eniri en ensemblon aŭ konservatorion. Ŝi elektis la gestudentojn laŭ ilia sindediĉemo kaj sentemo al muziko, lernokapablo kaj diligenteco. Ĉiuj akceptitaj gestudentoj devis esti provitaj dum tri monatoj pri ilia taŭgeco.

Kvankam Bao Guifang sciis, ke estas malfacile turni tiujn gejunulojn en elstarajn kantistojn, ŝi tamen havis la memfidon bone plenumi la instruadon. Ŝi mem instruis la ĉefan kurson de voĉmuziko kaj klopodis por helpi la gestudentojn mastri la eŭropan sciencan kantmanieron kaj ĝin kombini kun la ĉina nacia kantmaniero kaj fine kreis sian voĉmuzikan skolon. Ŝi postulis ke en kantado la studentoj atentu pri esprimo de sentoj per la voĉo kaj mieno. Por rapide kaj plenamplakse levi la muzikan kaj literaturan klercon de la gestudentoj ŝi

petis emeritan filipinan instruiston, kiu laboris dekojn da jaroj en Ĉinio, instrui al ili solfeĝon kaj muzikan teorion; petis instruiston de la Jilin-a Arta Instituto kumule instrui la kurson pri aprecado de muzikaj verkoj; kaj invitis filman dublantaron instrui elparolon. Ŝia duonkripla edzo, fama scenara tradukisto, ne nur aktive subtenis ŝian instruan laboron sed ankaŭ kun plezuro funkciis kiel instruisto de literatura kurso.

En studado la instruistoj kaj studentoj bone kunagis, iuj studentoj bone progresis post nur 7-monata lernado. La 21-jara sopranistino Chen Shuyan antaŭe estis laboristino. Ŝi ellernis la kantadajn teknikojn post nur 1-jara lernado. En kantado de pecoj el la opero "Carmen" kaj "Kanto de Cigano" ŝi sukcese prezentis gajan senbridecon, ardan pasion kaj spritecon. Wang Na, kiu antaŭe laboris en popolamasa arta domo de baza nivelo, estas kantema, tamen pro la erara kantmaniero ŝia voĉo aŭdiĝis laringa kun malhela tembro, kaj post kantado de 2 aŭ 3 kantoj ŝi jam sentis laciĝon. Post la lernado en la grupo dum 8 monatoj, ŝi ne plu sentis laciĝon eĉ post kantado de 7 aŭ 8 kantoj per bela voĉo kun riĉa tembro. Ankaŭ Jiang Xiaobo, kantistino de koloratura soprano, kiu antaŭe estis brodistino, estas kantema de la infaneco kaj lernis kantadon de multaj homoj, tamen ne trovis ĝustan voĉon en tekniko. En la komenco ŝi intencis ĉesigi sian lernadon ĉe Bao Guifang, pro la malfacileco en korektado de sia kantmaniero. Nur post admonado de Bao, ŝi ĉesis ŝanceliĝi. Post pli-ol-1-jara diligenta lerna-



Bao Guifang (la unua de dekstre) en instruado

do ŝi povis delikate prezenti la kontraŭdirojn en la koroj de la herooj kiam ŝi kantis elektitajn pecojn el "La Traviata" kaj "Ario de Violettais". En tiu instrua grupo estas plej bona kantistino de koloratura soprano nomata Zhou Jianxia. Antaŭe ŝi estis aktorino de ensemblo de iu gubernio. En la komenco de sia lernado en tiu grupo ŝi ne povis bone uzi la kantadajn teknikojn kaj ofte miskantis la tonojn. Kaj ŝin ĉagrenis precipe tio ke ŝi estis malsanema. Kaj nur post kantado de du kantoj ŝi jam ekspirigis. Tiam Bao Guifang venigis ŝin en sian hejmon kaj zorgeme ŝin flegis kiel sian filinon kaj helpis ŝin starigi memfidon en la lernado. Post certa tempa flegado, la sano de Zhou fortiĝis kaj paŝo-post-paŝe leviĝis ŝiaj kantadaj teknikoj. Pro ŝia pli kaj pli bona kantado, iuj nomis ŝin "malgranda Bao Guifang". Per sia klara hela voĉo ŝi fine povis lerte kanti daŭre pli ol 10 diversstilajn kantojn ĉinajn kaj fremdlandajn.

Bao Guifang zorgadis la vivon de gestudentoj kiel patri-no, tamen en la instruado ŝi estis rigora al ili. Ekz. en ekzameno, Zhou Jianxia misrespondis donante eraran nomon de la verkinto de la okcident-eŭropa fama kanto "Najtingalo kaj Rozoj", ŝi ricevis severan kritikon de Bao kaj ekploris ĉagrene. Ŝi profunde hontis pro sia maldiligenteco en lernado kaj malseriozeco en arto. Tiu afero ankaŭ profunde edukis la aliajn gelernantojn de la grupo; ili ekkomprenis, ke se oni volas fariĝi vera kantisto, oni devas esti serioza, sincera kaj respektema al la arto. La laboraj kondiĉoj de Bao Guifang estis nebonaj, la du klasĉambroj estis simplaj kaj la tri pianoj malnovaj. Tamen la gestudentoj bone progresis en la du-jara lernado. Sur scenejoj de grandaj urboj de nordorienta Ĉinio kaj Beijing ili prezentis sukcese kaj rikoltis varmajn laŭdojn. Multaj diris, ke krom bona funkciigo de la konservatorioj en Ĉinio oni ankaŭ devas disvolvi la instruan voĉon trovitan de Bao Guifang.

En manĝejo de mallarĝaj vermiĉeloj

(Novelo)



MI estis reveturonta al la urbo per mallarĝrela trajno, kiu startos post noktomezo. Estis ankoraŭ frue kiam mi forlasis la hotelon. Mi do promenis sur la rekta komerca strato de la karbur-beto.

La luno hele lumis sur la gruzan straton. Ĉiuj butikoj jam fermis la pordojn. Aŭdiĝis ankoraŭ malklara muzikado el proksima teatro: eble la teatraĵo baldaŭ finiĝos. Fariĝis pli kaj pli malvarmete en tiu aŭtuna nokto. Mi kunpremiĝis kaj estis atingonta la stratfinon. Subite frapis miajn okulojn neĝbrilantaj lumoj el la antaŭa dometo kun allogantaj ruĝaj vortoj “Vermiĉela Manĝejo” sur vitra fenestro. Alproksimiĝinte al ĝi, mi rigardis tra la fenestro kaj vidis ke interne staras nur tri rondaj manĝotabloj kaj estas neniuj klientoj. Nur unu bufedistino, apogante sian vangon sur la dekstra mano, sidas super iu libro. Post momenta hezito mi enpaŝis.

La bufedistino tuj stariĝis. Ŝi portis blankan kaptukon. Laŭ aspekto ŝi estis maksimume 21-22-jara. Sur la ovala vizaĝo de tiu svelta knabino brilis paro da saĝaj okuloj. Vidinte min, ŝi ridetis al mi: “Sidiĝu, kamarado! Ĉu vi volas bovlon da vermiĉeloj?”

Mi kapjesis kaj mire demandis: “La manĝejo ankoraŭ laboras en tiel malfrua horo?”

“Eĉ ĝis la 2-a horo post noktomezo,” respondis ŝi kviete.

Ŝi eniris en la kuirejon. Mi foliumis ŝian libron sur la manĝotablo kaj trovis ke ĝi estas “Notlibro de Ĉasisto” verkita de Turĝenev. Eĉ en tiu izolita urbeto troviĝas mia literatura ŝatanto! Mi ekĝojis. Momenton poste, ŝi portis al mi bovlon da varmaj vermiĉeloj kaj boteleton da paprika oleo. Gustumante vermiĉelojn, mi admiris: “Ha, ja me-tiartaĵoj ili estas!”

La knabino ekridis kaj sidiĝis oblikve ĉe mia manĝotablo, demandante: “Eble vi ne estas lokano, ĉu?”

“Mi laboras en ĵurnala redakcio.”

La knabino ekradiis de ĝojo, turnis sin rekte al mi kaj fiksis sur mi scivolan rigardon. Ŝajnis ke ŝi volas ion diri. Ĝuste en tiu ĉi momento aŭdiĝis de ekstere ridoj, paroloj kaj paŝbruoj—La teatraĵo finiĝis kaj homoj torentis sur la straton. Subite eksonis stranga tirata voĉo—“Ankoraŭ unu bovlon da vermiĉeloj!” Je tio malfermiĝis la pordo kaj aperis junulo kun longaj kapharoj kaj densaj mallongaj lipharoj. “Mastrino, eble vi baldaŭ fariĝos kapitalistino? Riĉiĝon! Ha, ha. . .” ridaĉe provokis la junulo, starante kun unu piedo ekster la sojlo kaj kun la alia interne de ĝi.

“Ĉu estus hontinde, se mi riĉiĝos dank’ al mia propra laboro?” abrupte leviĝis kaj kontraŭdemandis la knabino.



La junulo tuj forŝteliĝis, rimarkinte fremdulon interne.

“Kio?” mi demandis nekomprene, rimarkinte ke ŝiaj stele brilantaj okuloj estas plenaj de larmoj.

“Li estis mia kunlernanto. Ni ambaŭ fariĝis senlaboraj post la diplomitiĝo. Antaŭe li estis sendita al laboro en karbominejo, tamen li rifuzis tion pro la penigo kaj laco. Poste pere de iu konato li trovis laboron en la kontoro de ĉiovendejo. Li kelkfoje skribis al mi, ke se nur mi. . . , li tuj helpos min havigi al mi agrablan okupon. Li ne volas esti karboministo kaj opinias preferinda labori en la kontoro. Tamen, miavice, mi ja lin malestimas,” indigne diris ŝi post paŭzo.

“Ankaŭ la bufedistino laboras por la popolo. Pro kio li moknomis vin kapitalistino! Sensencaĵo!” mi forte ofendis pro la moko.

“Ĉar tiu ĉi manĝejo estas administrata de mia familio,” ŝi diris, ŝetinte rigardon sur min el brilaj okuloj.

Ŝia respondo komprenigis min. Mi ĉirkaŭrigardis la malvastan manĝejon: ĉio estas pura kaj elegante aranĝita.

Ĝuste tiam iu maljuna ĝiba laboristo eniris. La knabino afable kapsalutis lin kun rideto kaj iris en la kuirejon. La maljunulo sidiĝis apud mi. Mi vidis ke sur lia sul-koplena vizaĝo brilas paro da viglaj okuloj.

“Kamarado, eble vi estas alilokano? Kie vi laboras?” ekparolis li fiksante sian rigardon al mi.

“Mi laboras en ĵurnala redakcio,” respondis mi kun rideto, proponante al li cigaredon.

“Bone! Vi venis ĉi tien por intervjui? Raportu do pri tiu ĉi manĝejo!” ekscitiĝis la maljunulo, kaj frapis al si la femuron.

“Pro kio?” mi volis aŭdi lian opinion.

“Mi laboras en la karbominejo. Antaŭe, kiam mi havis noktan deĵoron, mi devis kunporti malvarmajn farunaĵojn. Tial kun tempopaso min trafis pirozo. Kiam la malsano atakis min, malvarma ŝvito malsekigis mian tutan korpon. Iunokte, kiam mi finis mian deĵoron kaj surstratiĝis, subite mia stomako ekdoloris al mi terure. Feliĉe, min rimarkis tiu ĉi bonkora knabino, ŝi prenis al mi du tablojdojn kaj akom-

panis min ĝis la hejmo. . .” rakontis la maljunulo laŭte.

“Tiunokte,” intermetis la knabino, alportinte bovlon da vermiĉeloj antaŭ la maljunulon, “mi aŭdis dolorĝemon el ekstere kaj rapidis tien. Tiu okazaĵo inspiris min kaj mi pensis: Apud nia urbeto estas karbominejo kaj fabrikoj. Do kiel bone estus, se ĉiuj laboristoj povus ĝui varmajn vermiĉelojn post sia nokta deĵoro.”

“Mia stomaka malsano multe mildiĝis de kiam la knabino Jinfeng malfermis tiun ĉi noktan lunĉejon,” kun dankemo kaj emocio diris la maljunulo.

“Kio? Ĉu ŝi nomiĝas Jinfeng?” Mia koro ekbatis iom rapide. Mi haste demandis, fiksante rigardon sur ŝi: “Ĉu vi kontribuis al la redakcio serion da lirikaj poemoj ‘Printempo Saturis la Karburbon’?”

“Ĝi estas kune verkita de mi kaj mia kunlernanto. De kie vi informiĝis pri tio?” la knabino respondis kun kapjeso, larĝe malferminte siajn okulojn pro miro.

“Mi ja estas la redaktoro, kiu letere respondis al vi,” diris mi ride-tante.

Ŝi saltis de ĝojo manklakante kaj dirante: “Li estas karboministo. Ni ambaŭ amas literaturon. La redakcio postulis ke ni resendu al ĝi la poemaron post revizio; ĝin ni reviziis hieraŭ.” Ĉe tiuj vortoj ŝi sin turnis por preni la verkon, dume la pordo knare malfermiĝis kaj eniris kelkaj ministroj post la nokta deĵoro.

“Kamaradino Jinfeng, unue vi akceptu la klientojn kaj ne hastu preni la verkon,” mi ŝin haltigis.

Dirinte jeson, ŝi facilpaŝe iris al la kuirejo. Post kelkaj paŝoj ŝi subite sin returnis kaj kun rideto diris al mi ĝoje: “Vi estas ĉiam bonvena al nia manĝejo.”

* La aŭtoro estas karboministo.


La pitoreska Songshan-monto


Fotoj de ZHOU QINJUN

La pagodo Songyue



La templo Shaolin





Songshan-monto en malproksimo



Pagodaro de la templo Shaolin

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Miskantoj (*Miscanthus japonicus*)
de FUSACUGU KIDO (Japanio)



Nubmaro ĉe Versiliaj Apŭamaj Alpoj

de ALBERTO C. STAGI (Italio)



Songshan-monto

de ZHOU HUA

SONGSHAN-MONTO —unu el la kvin famaj montoj de Ĉinio —situas en okcidenta Henan-provinco. Ĝi konsistas el la du partoj Taishi kaj Shaoshi, kaj ĝiaj 72 pintoj horizontale staras majeste en centra Ĉinio. La ĉefa pinto Junji de la monto Taishi 1,584 metrojn super la marnivelo estas la plej alta en Songshan-monto.

La majesta Songshan-monto havas ne nur naturajn pejzaĝojn de groteskaj ŝtonoj, arbaroj, fontoj kaj akvofaloj, sed ankaŭ multajn famajn historiajn restaĵojn.

LA PATRINA MONUMENTO KAJ SONGYANG-KOLEGIO

Sude de la monto konserviĝas la antikva civilizacio de la ĉina nacio —la tri monumentoj de Han-dinastio, la pagodo Songyue kaj la kolegio Songyang.

La pagodo Songyue kun 15 etaĝoj konstruita en la 6-a jarcento altas je pli ol 40 metroj kaj estas brika pagodo plej frue konstruita de Ĉinio. Tiam mankis al la konstruantoj kalko, tial ĝi estis masonita per glueca flava tero kaj post pli ol 1,400 jaroj ĝi ankoraŭ estas fortika.


La tri monumentoj de Han-dinastio konstruiĝis pli frue je 4 jarcentoj ol la pagodo Songyue. Al la Patrino Monumento —unu el la tri monumentoj— restis nur du grandegaj blujaj ŝtonoj. Legendo


diras, ke ĝi estas transformita el Tushan —edzino de la inundobrida heroo Dayu en la antikva Ĉinio. Tiam sur la ĉina tero furiozis inundado, kiu kaŭzis al la popolo senfinan suferon. Dayu gvidis popolon por bridi la inundon kaj ne hejmenrevenis, trifoje preterpasante sian domon en 13 jaroj. Post brido de la inundo, li revenis al sia hejmloko, kaj lia edzino jam transformiĝis en bluen ŝtonon pro longa atendo de la edzo. Palpante la ŝtonon, Dayu plorĝemis: “Vi mortis tro frue, ni ankoraŭ malhavas filon!” En tiu momento la ŝtono fendiĝis brue en

du pecojn kaj eliĝis bebo. Dayu donis al ĝi la nomon Qi. La fendita ŝtono estis nomita la Ŝtono Patrino de Qi. Dum miloj da jaroj la ĉina popolo karmemoris la inundobridan heroon kaj zorge protektis la bluan ŝtonon. Frue en la Orienta Han-dinastio de la dua jarcento oni jam tie konstruis templon kaj monumenton, sed bedaŭrinde ili jam malaperis.

Okcidente de tie, trans antikva cipresaro estas Songyang-kolegio —unu el la 4 grandaj kolegioj de la antikva Ĉinio. En la korto troviĝas du grandaj fortaj cipresoj noma-

La Ŝtono Patrino de Qi





Junji-pordego de la templo Zhongyue

taj Generaloj. Legendo diras, ke en la dua jarcento a. K., imperiestro Wudi de Han-dinastio turisme venis al tiu loko. Li vidis rektan imponan cipreson tie staranta kaj nomis ĝin "Granda Generalo". Poste li vidis alian cipreson pli altan kaj pli dikan, sed li jam donis al la unua la nomon "Granda Generalo" kaj pro tio nur povis titoli la duan "Dua Granda Generalo". Se la legendo estas vera, la du cipresoj aĝas almenaŭ dumil jarojn.

La kolegio konstruiĝis en la 5-a jarcento. En Tang-dinastio (618-907 p. K) ĝi jam estis grava loko de kulturaj aktivadoj. La granda poeto Bai Juyi verkis poemon por priskribi sian impreson pri rigardo de kanto-danca prezentado en la kolegio. La prezentita kanto-danco konsistis el 12 partoj kaj centoj da aktoroj estis bezonataj por prezenti la dancon laŭ kantado. Ke Bai

povis apreci tian prezentadon, tio montris prosperecon de kulturaj aktivadoj en Songshan.

En Song-dinastio (960-1279 p. K), la kolegio fariĝis fama, kaj la nombro de ĝiaj lernantoj atingis centojn en flora periodo. Tiam famaj instruistuloj lekciis tie. Ĝi ludis certan rolon en kultura eduko kaj akademia interŝanĝo.

LA TEMPLO SHAOLIN

Inter la montoj Taishi kaj Shaoshi troviĝas konstruaĵo ĉirkaŭita de ruĝa muro. Ĝi donis vivecon al la montoj. Ĝi estas la templo Shaolin — la naskiĝloko de Ĉansekto de la budhismo de Ĉinio.

La templo konstruiĝis en la lastaj jaroj de la 5-a jarcento. En la pasintaj pli ol mil jaroj, ĝi plurfoje ruiniĝis de milito, plej serioze en

1928. Tiam iu militaristo bruligis plejparton de la domoj, la incendio daŭris pli ol 40 tagojn. La longtempe akumulitaj historiaj objektoj kaj budhismaj raraĵoj preskaŭ ĉiuj estis cindrigitaj. En la lastaj jaroj la ŝtato asignis grandan sumon da mono al ĝia riparado, interalie la freskoj pri la 500 arahatoj adorantaj Ŝakjamunion kaj bonzoj de la templo Shaolin sin ekzercantaj per ĉina bokso jam estis riparitaj. La personoj en la freskoj estas ver-similaj kaj havas malsamajn pozojn. La pentrarto estas eminenta kaj la koloroj helaj. Ili ja estas raraĵoj el la ĉinaj freskoj.

La memorŝtonoj de la templo Shaolin estas bonege konservitaj. Pli ol 300 memorŝtonoj kvadrataj, rondaj, romboj kaj rektangulaj surhavas pli ol 300 gravuritajn surskribojn, kiuj registris leĝojn kaj sistemojn de la pasintaj dinastioj,

tabuojn kaj doktrinojn de budhis-
toj, la historion de la templo kaj
notojn de turistoj, kiuj ĉiuj tre
valoras por historia esplorado.

Post la templo troviĝas ŝtona
vojeteto kondukanta rekte al la ka-
verno Bodhi-dharma, kiu profundas
je 7 metroj kaj larĝas je 3 metroj.
La kaverno estis loko, kie la kreinto
de Ĉan-sekto de la ĉina budhismo
Bodhi-dharma praktikis la budhis-
man doktrinon en naŭ jaroj.

LA TEMPLO ZHONGYUE

Sur deklivoj kaj en valoj de
Songshan staras multaj temploj, inter
kiuj la templo Zhongyue kun strik-
ta strukturo estas plej bone konser-
vita konstruaĵaro.

Post pliaj konstruigoj faritaj de
feŭdaj regantoj en la pasintaj dinas-
tioj, la templo posedas domojn kaj
ĝardenojn kun areo de 370,000
kvadrataj metroj. De la pordego
Zhonghua ĝis la pavilono Yushu
troviĝas 11 kortoj. La konstruaĵoj
vidiĝas inter antikvaj cipresoj. La

tintado de la templaj sonoriloj kaŭ-
zita de montvento rezonas mal-
proksimen kaj tiel faras la monton
pli kvieta kaj soleca. Nun la tem-
plo servas kiel muzeo. Ĝiaj kvar
feraj statuoj altaj je preskaŭ 3 me-
troj estis faritaj en la 11-a jarcento.
Ili ĉiuj versimile elstarigas la brus-
ton kun koleraj okuloj kaj pugnitaj
manoj. Ili estas valoraj por esplori
la metalurgian historion de la an-
tikva Ĉinio. En la templo troviĝas
ŝtona plato de Jin-dinastio (1115—
1234 p. K.) kun gravurita skizo per
perspektiva metodo, kiu montras la
konstruan aranĝon de la tiama tem-
plo. Ĝi estas valora materialo por
esplori la konstruan historion de la
antikva Ĉinio.

GNOMONA TERASO

Ĉ. 20 kilometrojn sudoriente de
Songshan troviĝas kvieta korto. En
ĝi konserviĝas la fama antikva
gnomona teraso. Oni diras, ke an-
taŭ 3,000 jaroj, antikvuloj jam tie
mezuris la ŝanĝiĝojn de la suna
ombro por difini la tempon, pozi-

cion kaj kalendaron. En la korto
troviĝas ankaŭ ŝtonplato pri mezu-
rado de la suna ombro starigita de
Tang-dinastio.

Tiu 9-metre alta teraso el grizaj
brikoj estis konstruigita de astro-
nomo Guo Shoujing de Yuan-
dinastio. En 1279 sinsekve kons-
truigis 27 observatorioj en la vasta
teritorio de Yuan-dinastio. Song-
shan situas en centra Ĉinio, tial la
teraso en tiu loko fariĝis pli grava.
Printempe de 1280, Guo Shoujing
kaj aliaj astronomoj faris novan
kalendaron, kiu estis publikigita en
la lando. La nova kalendaro di-
finis, ke unu jaro nombras 365.2425
tagojn, kiuj estas malpli longaj je
nur 26 sekundoj ol la tempo bezo-
nata de tergloba revoluo ĉirkaŭ la
suno. Tiu nova kalendaro estas
tute sama kiel la nuna sunkalen-
daro, sed pli frua je 300 jaroj ol
la lasta. Pro tio Guo Shoujing ri-
cevis respekton de la monda popolo.
El la ringaj montoj de la luno unu
estas internacie nomata "Guo
Shoujing".

Bronza statuo de Weituo en la templo Shaolin



Bronza statuo de Jinnaluo en la templo Shao'in



Tianjin—havenurbo de eksterlanda komerco

ĈIFOJE mi unue vizitis la Metiartan Fabrikon de Tianjin (Tiangin) kaj pririgardis tie provlundon de giganta skolopendrokajto, kiu konsistis el 40 eroj kaj longis 35 metrojn. Ĝia kapo aspektis kiel tiu de monstro kun arĝenta ringo pendanta de la naztruoj. Kiam laboristoj flugigis la kajtegon, kiu kostis 1,000 usonajn dolarojn, ĝi impresis kiel vera skolopendro en la aero. Oni diras, ke la kajtoj de Wei Yuantai, la novjaraj bildoj de Yangliuqing kaj la argilaj figuroj faritaj de Zhang Mingshan estas la tri specoj de tradiciaj metiartaĵoj de Tianjin, kiuj akiris grandan renomon tra la tuta lando kaj estas tre bonvenigataj de fremdlandaj komercistoj kaj ĉinaj elmigrintoj. Konsiderinda kvanto da tiaj varoj estas eksportata ĉiujare. En la jaro 1944, kajtoj faritaj de Wei Yuantai estis premiitaj per ora medalo en la Panama Internacia Foiro.

LA PORDO DE LA NORD- ĈINIA EBENAĴO

La urbo Tianjin situas je 137 kilometroj oriente de Beijing (Pekino). Ĝi kaj ĝiaj gubernioj havas areon de 11,000 kvadrataj kilometroj kaj 7,410,000 loĝantojn. Ĝi estas unu el la tri municipoj de Ĉinio (la aliaj 2

estas Beijing kaj Shanghai). Ĝi situas ĉe la orienta rando de la Nordĉinia Ebenaĵo kaj vizaĝas al Bohai-golfo. Ĝi estas la plej granda komerca havenurbo en norda Ĉinio kaj grava trafika centro. La aortaj fervojaj linioj interligantaj Harbin en la nordo kaj Shanghai en la sudo trapasas ĝin. En la pasinta jaro, pli ol 1,600 eksterlandaj kaj ĉinaj varŝipoj vizitis ĝian havenon Xingang (Hingang). La flughaveno de tiu urbo estas ekipita per moderna direkta sistemo kaj povas akcepti grandajn pasaĝerajn aviadilojn. Tianjin komercadas kun pli ol 140 landoj kaj regionoj kaj interligiĝis jam kun Kobe de Japanio, Filadelfio de Usono kaj Melburno de Aŭstralio kiel amikaj urboj.

En la 19-a jarcento, Tianjin estis komerca havenurbo de duonkolonia ekonomio, en kiu troviĝis koncesiaj kvartaloj kaj firmaoj de ok fremdaj landoj. Tiam ĝiaj financo kaj dogano estis tenataj de fremdlandaj kapitalistoj. Tiam la ĉina nacia kapitalo funkciigis tie nur kelkajn feraĵajn metiejojn, ŝpinojn kaj alkal-farejojn. Ĝia industrio multe disvolviĝis nur post la fondo de la popola registaro en 1949. Nun ĝi havas 4,000 industriajn entreprenojn de 156 branĉoj, inkluzive de nove konstruitaj fabrikoj de pe-

trolo, precizaj instrumentoj kaj koloraj televidiloj. De la jaro 1979, 28 specoj de produktaĵoj inkluzive de tapiŝoj, muzikiloj, bicikloj, brakhorloĝoj, aromaĵoj kaj lanaj teksaĵoj gajnis orajn aŭ arĝentajn medalojn de la ŝtato. Multaj el ĝiaj produktaĵoj ĝuas grandan renomon en- kaj eksterlande.

PERSPEKTIVOJ DE LA BAZO DE EKSPORTADO

En la sekvanta tago mi intervjuis Wang Guangying, vicurbestron kaj prezidanton de la Internacia Konfida kaj Investa Korporacio de Tianjin. Tiu spertoriĉa ekonomikisto kun larĝkadraj okulvitroj parolis tiel gaje kaj sprite, ke li montris nesian signon de sia granda aĝo de pli ol 60 jaroj. Li montris plenan fidon al la decido de la ŝtato turni la urbon en bazon de eksportado. Li prezentis al mi la konturon de tiu disvolviĝanta eksporta bazo.

Delonge Tianjin jam estas centro de interŝanĝado de varoj inter la nordorienta, nordokcidenta kaj norda partoj de Ĉinio. Ĝi estas la ĉefa produkto de la fama salo de Changlu. Ĝi ankaŭ havas riĉan rezervon de petrolo kaj natura gaso, kio estas bona kondiĉo por disvolvo de mara kaj petrola kemi-industrioj.

Krome, la petrolkampoj de Renqiu, Dagang kaj Bohai, la famaj produktoj de grenoj kaj kotono de la Nordĉinia Ebenajo, la karbominejoj de Kailuan kaj Datong kaj la ferminejo de orienta Hebei-provinco ĉiuj troviĝas proksime de tiu urbo. Ĉio tio estas favoraj kondiĉoj por ke Tianjin konstruiĝu en bazon de eksterlanda komerco.

Nun, la nombro de la Tianjin-aj entreprenoj produktantaj eksportajn varojn kaj necesajn materialojn por tiaj varoj kovras duonon de tiu de la entreprenoj de tiu urbo. Kaj ĝi produktas diversajn eksportatajn varojn, de gigantaj hidraŭlikaj premiloj 6,000-tunaj ĝis fajnaj eburaj kaj jadaj skulptaĵoj malgrandaj kiel grenero.

Hodiaŭ, Tianjin jam havas relative stabilan reton de eksportado kun pli ol dekmil agentejoj kaj perantaj komercejoj en la tuta mondo. La totalaj eksporta valoro kaj enaĉeta valoro de varoj de tiu urbo en 1980 duobliĝis kompare kun tiu de 1978.

Antaŭ nelonge, Tianjin jam subskribis 67 interkonsentojn


pri prilaborado kaj muntado de produktaĵoj kun pli ol 200 kompanioj de Eŭropo, Ameriko, Japanio, Xianggang (Hongkong) kaj Aomen. Krome ĝi ankaŭ subskribis interkonsentojn pri kompensa komerco de salikokobredo, konteneroj kaj 3 milionoj da spindeloj kaj kune funkciigataj vinfarejoj kaj horloĝa fabriko.


IMPRESOJ PRI TIANJIN-AJ FABRIKOJ

Antaŭ nelonge, reprezentantoj de 165 Tianjin-aj fabrikoj ĝoje ricevis en la ĉefurbo Bejĝing atestilojn pri la fabrikaj markoj de siaj famaj produktaĵoj. Interalie troviĝis la markoj "Velŝipo" por tapiŝoj, "Mevo" por brakhorloĝoj, "Papago" por akordionoj, "Fluga Cervo" por aromaĵoj, "Ĝermo" por bombonoj kaj "Triangulo" por manĝilaroj el nerustiĝa ŝtalo, kiuj famiĝis eksterlande. Por akiri informojn pri tio, mi vizitis 7 el tiuj fabrikoj. Kvankam mi faris nur rapidan trarigardon, tamen tre profundajn impresojn mi ricevis.

Unue mi venis en la Muzikalan Fabrikon de Tianjin kaj vidis tie, ke laboristoj estis muntantaj 120-basklavajn akordionojn. Teknikisto Liang diris al mi, ke la esenca punkto en prijuĝo de muzikilo estas tio, ĉu ĝiaj sonoj plaĉas aŭ ne al la oreloj, kaj montris al mi la kernan parton de akordiono — anĉojn. La interspaco inter la langetoj kaj la kadroj estas nur 0.04 milimetro. "Dank' al apliko de la unika kunsona parto kreita de nia fabriko al tiaj anĉoj," diris Liang en ekscito, "la basaj tonoj estas riĉaj kaj profundaj, la mezaltaj estas mildaj kaj la altaj estas klaraj kaj penetraj." Li diris, ke tiu fabriko sukcese elfaris kunsonilon, kiu povas fari efekton de stereofoniaj sonoj. Tiu renovigo gajnis teknican premion de tiu urbo. Li diris al mi ankaŭ, ke japana akordionistino Miki Joŝie, kiu trifoje gajnis la ĉampionecon en internaciaj akordionaj konkursoj, ludis Papago-akordionon produktitan de ilia fabriko dum sia vizito al ĝi kaj diris ŝate: "Tre belaj tembroj, tre belaj!" Nun la nombro de la eksportataj

La haveno Xingang en nokto





Tianjin-aj tapiŝoj
renomaj en kaj ekster
Ĉinio

akordionoj produktitaj de tiu fabriko konsistigas du trionojn de tiu de akordionoj eksportataj de nia lando.

La Unua Aromaĵa Fabriko de Tianjin produktas kumarinon, kiu estas nepre necesa por produkti kosmetikaĵojn kaj tualet-sapojn. Nun la produktaĵo de tiu fabriko jam estas same bona en fizika kaj kemia kvalitoj kiel Rhodia-produktaĵoj de Francio kaj trovis merkaton en Japanio kaj Britio. Inĝenierino Xia Yanqiu diris al mi, ke la sekreto de la sukceso kuŝas en tio, ke novaj teknologiaj ekipaĵoj estas aplikitaj. Hodiaŭ dekoble kreskas la eksporta kvanto de aromaĵoj kun marko "Fluga Cervo" kaj tamen ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonojn de la merkato.

Originala anonco pri la kalendara brakhorloĝo aŭtomata kun marko "Mevo" produktita de la Brakhorloĝa Fabriko de Tianjin: brakhorloĝo en orfiŝa akvario vekis intereson ĉe la rigardantoj. La laboristoj de tiu fa-

briko elfaris jam Mevo-brakhorloĝojn de 72 diferencaj formoj. Oni diris al mi, ke ĝiaj produktaĵoj estas bone akceptataj ankaŭ pro tio, ke ĝi ankaŭ prilaboras materialon kaj maŝinpartojn liveritajn de eksterlandaj komercistoj laŭ teknologio importita, kio akcelas la altiĝon de la teknika nivelo de ĝiaj labor-

istoj kaj konigas la staton kaj postulojn de la internacia merkato al ĝiaj respondeculoj.

Iutage, post kiam la gastoj el kvin japanaj kompanioj gustumis enladigitajn manĝaĵojn por festeno nove preparitajn laŭ ĉina gastronomio, ili laŭdis ripetfoje: "Tre bonguste", "Bongustege"

La Muzikila Fabriko de Tianjin invitas al si muzikiston por peti lian opinion pri la kvalito de muzikiloj.



kaj tuj mendis 1,800 kestojn da ili.

La Manĝaj-fabriko Amikeco de Tianjin speciale faris laŭ ĉina gastronomio por-festenan enladigitan manĝoserion el 8 pladoj kaj 1 supo, nome frikasita fiŝo, fritita porkaĵo, vaporumita kokaĵo, bovajo kun tomato, salato, kokidaja supo k.a. La nova produktaĵo estas varme akceptata de fremdlandaj komercistoj kaj elmigrintaj ĉinoj.

Mi informiĝis ankaŭ, ke la bombonoj de marko "Ĝermo" produktitaj de Limin-manĝaj-fabriko de Tianjin ĝuas debiton en 26 landoj. La ĉokoladaj grajnoj produktitaj de tiu fabriko estas fragilaj kaj plaĉaj al la buŝo, kaj estas kompareblaj kun la fama produktaĵo de la brita Kompanio Rowtree. Ĝiaj literformaj molaj bombonoj gustas kiel diversaj fruktoj kaj Kuvajto sola aĉetas 50 tunojn da tio, en ĉiu jaro.

Iutage mi vizitis la Tapiŝan Fabrikon de Tianjin. Ĝia laboristo fiere diris al mi, ke la impona tapiŝo Granda Muro pen-



Brakhorloĝoj de marko "Mevo" en orfiŝa akvario

danta sur muro de ripoza salono en la sidejo de UNO estas farita de ilia fabriko el lanfadenoj de 240 koloroj. Tia altklasa tapiŝo zorge teksita permane el bone elektitaj fadenoj glatas kiel atlaso kaj ĝia desegno similas al reliefo. Kvarono de la totala kvanto de eksportitaj tapiŝoj de nia lando estas fabrikita de tiu entrepreno.

Por altigi la konkurencon povon de siaj eksportitaj varoj en la internacia merkato, Tianjin speciale fondis pakadan kom-

panion. Iu laboranto Zhang diris al mi interesan okazaĵon: Rozo-vino estas speciala produktaĵo de Tianjin. Tiu vino preparita laŭ esotera recepto estas aroma kaj bongusta kaj francaj komercistoj ĝin nomis ĉina brando en komparo kun la brando produktita de ilia lando. Antaŭe oni ne zorgis pri beligo de la boteloj uzataj por tiu vino, tial ĝi ne altiris al si multan atenton. Nun post kiam oni uzas belformajn botelojn kun ore presita marko, la eksporta kvanto de ĝi pliiĝis ĝis 500 tunoj, kaj tamen la bezono de ĝi en la merkato ankoraŭ ne estas kontentigita.

Gelaboristoj de la Metiarta Fabriko de Tianjin renovigas faradon de kajtoj.



NOVA FIZIONOMIO DE LA HAVENO

Mi ankaŭ veturis al la haveno Xingang per speciala aŭtobuso de la Transporta Kompanio de Ekstera Komerco por ĝin pririgardi. Mi vidis tie, ke granda kvanto da varoj estas enŝipigata. Nokte, la haveno estis prilumata de sennombraj lampoj kaj la pordarganoj kaj forkolevmasinoj estis en streĉa laboro. La 16,000-tonela varŝipo Staff de la Ĉina-Pola Ŝipkompanio, an-

krita ĉe la 3-a ankrejo, estis akceptanta 16 kontenerojn kaj kemiaĵojn, kuracilojn kaj aliajn lokajn produktaĵojn kaj baldaŭ ĝi forveturos al norda Eŭropo.

La haveno Xingang situas ĉe la buŝo de la rivero Haihe kaj ĉiujare ĉe ĝi en- kaj el-ŝipiĝas pli ol 12 milionoj da tunoj da varoj, 70% el kiuj estas importitaj aŭ eksportitaj. Ĝiaj specialaj fervojaj linioj longas entute 90 kilometrojn kaj ĝiaj kajoj longas entute pli ol 4,000 metrojn. Ĝi estas ŝirmata de du ĝetoj kun totala longeco de 8 kilometroj. Post drago en la lastaj jaroj, la naviga vojo duoble plilarĝiĝis kaj la akvo pliprofundigis je pli ol 1 metro.

Parolante pri la konstruado de tiu haveno inĝeniero Liu Kang de la haveno diris al mi emocie: "Tiu ĉi estas la plej granda artefarita haveno en norda Ĉinio." En la komenca periodo post la Liberigo, la naviga vojo malprofundiĝis pro sedimentado kaj ŝipoj kun kapacito de 10,000 toneloj povis atingi la ankrejojn nur dum fluso. Nun oni jam konstruis ĉe ĝi du kajojn por ŝarĝado de 35,000-tonelaj ŝipoj per loza greno kaj 15 kajojn por ŝarĝado de 10,000-tonelaj varŝipoj, el kiuj 12 jam estis transdonitaj al uzado.

Kiam mi venis al la 3-a baseno de la haveno, mi vidis, ke mevoj flirtadas super la maro kaj draĝo estas laboranta en mal-

proksimo. Moderna kajo por en- kaj el-ŝipigado de konteneroj jam estas fundamente finkonstruita. Ĝi estas la unua tia konstruaĵo projektita de nia lando. La kontenera frajtoŝtacio kun areo de 5,400 kvadrataj metroj jam alte staras sur la bordo kaj 2 surbordaj konteneraj arganoj kun alteco de 77 metroj jam estas instalitaj kaj baldaŭ komencos labori. Mi vidis, ke 20-futojn longaj konteneroj ŝarĝitaj estis rapide levitaj de forkolevmaŝinoj kaj poste forportitaj de grandaj kamionoj.

Hodiaŭ, Xingang jam fariĝis konsistiga parto de la urbo Tianjin kaj ĝi estas preta renkonti la novan tempon de prosperiĝo de importado kaj eksportado.



RELATIVE RIĈA RIKOLTO DE GRENO EN ĈINIO

La Agrikultura Ministerio de Ĉinio deklaris, ke la jaro 1980 estis la dua plej bona jaro por Ĉinio en la produktado de greno post la fondiĝo de la popola respubliko, kvankam ĝia produktokvanto de greno reduktiĝis pro naturaj katastrofoj.

En la pasinta jaro la totala produktokvanto de greno de la tuta Ĉinio reduktiĝis je 10-15 miliardoj da kilogramoj kompare kun tiu de 1979 kaj estis je 5-10 miliardoj da kilogramoj pli multa ol tiu de 1978.

MULTE PLIGRANDIĜIS LA SUMO DE DEPONITA MONO

En la pasinta jaro la sumo de deponita mono de la urboj de Ĉinio

estis la plej granda post la fondiĝo de la popola respubliko. En la fino de novembro la deponita mono jam atingis 27.5 miliardojn da juaĵoj kaj tiu de la tuta jaro pliiĝis je 34.6% kompare kun tiu de 1979.

LA PLEJ GRANDA PASAĜERA STACIO DE HAVENO EN ĈINIO

La nomita stacio finkonstruiĝis en la Dalian-a Nova Haveno en nordorienta Ĉinio kaj ekfunkciis.

La ĉefa domego de tiu stacio kun areo de pli ol 16,400 kvadrataj metroj estas bone ekipita kaj havas diversajn servojn. Ĝi povas akcepti 1,500 en- kaj eksterlandajn pasaĝerojn.

ALIA ELEKTRIZITA FERVOJO

Lastatempe alia elektrizita fervojo de Ĉinio malfermiĝis al trafiko. Ĝi

komenciĝis de Baoji de Shaanxi-provinco kaj finiĝis je Tianshui de Gansu-provinco kaj estas grava parto de la Lianyungang-Lanzhou-a Fervojo kiu ligas la orientan kaj okcidentan partojn de Ĉinio. La elektrizado de la fervojo multe altigis ĝian transportan kapablon.

EKFUNKCIIS EN ĈINIO GENERATOROJ KUN KAPACITO DE 426,250 KILOVATTOJ

En la pasinta jaro Ĉinio ekfunkciigis novajn akvo-energiajn generatorojn kun totala kapacito de 426,250 kilovattoj kaj superplenumis la planon de la ŝtato.

La plejparto de la generatoraj kompletoj estas respektive kun kapacito de 35,000-50,000 kilovattoj kaj instalita ĉefe en la provincoj Fujian, Zhejiang, Liaoning kaj Guizhou.

Pupludo de infanoj

Fotoj de REN SHIYIN



Sub la gvido de instruistino, la infanoj de multaj infanĝardenoj en la urbo Guangzhou (Kantono) ludas pupteatraĵojn kun infanaj karakterizajoj. Tia ludo riĉigas ilian vivon kaj donas al ili bonan edukon.

▲ La infanoj pupludas sub la gvido de sia instruistino. ▼



Antaŭ kaj malantaŭ
la scenejo




Bonvenon!



Danco kun Ventumiloj


Katido Fiŝokas.




Ludo de baskulo kaj trapezo

Fotoj de YANG CHANGZHONG

Baskulludo



Ludo de trapezo



La Yanbian-a Korea Aŭtonoma Subprovinco de Jilin-provinco estas dense loĝata de ĉinaj koreoj. Tie vaste disvolviĝas tradiciaj popolaj sportoj, el kiuj la ludo de baskulo kaj trapezo estas aparte ŝatata de la junaj koreinoj.

ZHANG YANGUAN:



Ĝojo de la ĉasisto

Ĉasado en la Malgranda Xing'an-montaro

VINTRO estas ora sezono por ĉasado, kaj mi venis en la malgrandan Xing'an-montaron.

Estis mateno. Muĝis frosta vento. Sekvante iun ĉasistan

taĉmenton, mi iris en densa monta arbaro. Ĉiuj valoj estis ŝtopitaj de neĝo. La altegaj ruĝaj pinoj estis kirasitaj de firno.

Kvin ĉasistoj, en fela ĉapo el kapreola kapo, serĉadis tenante

necesan distancon inter si. Sekvis ilin bone dresitaj ĉashundoj. Iuj el ili portis akran hakilon ĉe la talio aŭ ponardon en la boto. La ĉapo estas farita el kapreola kapfelo, sur kiu estas konservitaj la haroj, nazo, oreloj kaj



LA UNUA ESPLORA OLEPUTO DE BOHAI-MARO KUNE BORATA DE ĈINIO KAJ JAPANIO

La unua esplora oleputo de la Bohai-golfa Olekampo kune ekspluatata de Ĉinio kaj Japanio estis ekborita en la fino de la pasinta jaro. Ĝi kun profundeco de 4,000 metroj estos finborita dum pli ol 100 tagoj. Laŭ la plano oni ekboros aliajn 5 putojn ĉijare.

100 MILIONOJ DA TUNOJ DA PETROLO EN 1980

Laŭ la statistiko de la Petrola Ministerio, Ĉinio produktis 105.8 milionojn da tunoj da petrolo kaj 13.7 miliardojn da kubmetroj da tergaso kaj per tio plenumis la ŝtatan planon.

SUBTERA HIDROELEKTREJO KONSTRUITA EN XINJIANG

La subtera hidroelektrejo estis finkonstruita lastatempe en la dezerto Taklimakan de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Ĝi pro-

duktas elektron utiligante neĝakvon el Kunlun-montaro, kiu fluas tra artefarita faldistanco de 32 metroj. La uzita akvo estas elkondukita tra la subtera kanalo por irigacii kampojn.

600 MILIONOJ DA TUNOJ DA KARBO EN 1980

Laŭ informo de la Ministerio de Karba Industrio, Ĉinio elfosis 600 milionojn da tunoj da karbo en 1980 kaj per tio plenumis la ŝtatan planon. Krome la entenaj kvantoj de karbaj pulvoro kaj ŝtono reduktiĝis je 0.45% kaj 0.12% respektive kompare kun tiuj de 1979.

okulkavoj kaj buŝo. De ĉasisto Wang mi informiĝis, ke kapreolo estas malforta inter la bestoj kaj ofte atakata de rabobestoj. En ĉasado la ĉasisto kaŝiĝis en vepro aŭ herbaro kaj iom vidigis sian ĉapon, kvazaŭ kuŝanta kapreolo, tiel ke li povis allogi rabobeston kaj surprizataki ĝin.

En la arbaro ni ofte surprizis ripozantajn birdojn. Rigardante paron da tetraosimilaj birdoj, mi demandis Wang: "Kiaj birdoj ili estas?"

"Ili estas tetraoj," respondis li fiere.

Tetrao kun plumoj ruĝaj, bluaj kaj flavaj aspektas tre belaj. Ĝia karno estas tre bongusta. Oni diris ke en la feŭda socio de Ĉinio ĝi servis kiel omaĝajo al imperiestroj.

Eklumiĝis en la densa arbaro. Kaj la tetraoj klukis pli forte.

Tetrao estas birdo kompare granda en la arbaro, kun pezo de 3-4 kg. Ĉasistoj diris, ke en la fino de printempo kaj la komenco de somero, kiam venas la pariĝa tempo de la birdoj, aroj da tetraoj pepas pro seksurĝo. Kiam ili "rondkuras", oni povas facile ilin kapti sen pafo.

"Rondkurado" ofte okazas en izolita densa arbaro. Dekkelkaj virtetraoj ĉirkaŭas unu tetraon per cirklo kaj kuregas el la tuta energio por venki la aliajn tetraojn kaj gajni al si la amon de la tetraino. Post kurado de kelka tempo la birdoj ege laciĝas kaj baraktas kuŝante surtere, kaj restas nur unu plej forta virtetrao. Ĝi flugas ĉe la tetraon. Ili kantas unu al la alia, kaj poste kune enflugas en la kvietan arbaron.

"Ŝŝ!" Wang atentige silentigis nin. Ni ĉiuj haltis. Mi streĉis la

orelojn kaj aŭdis frotbruon el la densa arbaro. La ĉashundoj estis tuj sin jetontaj antaŭen sed detenitaj de sia mastro. La bruoj pli kaj pli laŭtiĝis kaj finfine vidiĝis apro paŝanta al ni.

Wang senhezite sidiĝis kaj rapide glitis al la apro.

"Paf! paf!" la pafoj incitis tiun koloson pezantan je ĉ. 200 kg. En serioza vundo, la rabobesto sin jetis al la pafinto. Antaŭe mi neniam vidis tian danĝeran scenon kaj la koro ekbatis forte. Mi timiĝis pro Wang.


Tiumomente la apro jam estis tre proksima al la ĉasisto. Ta-

men li saĝe preterlasis ĝin. La ĉashundoj implikis la apron kio ebligis al li elpreni la ponardon. Per abrupta salto li sidiĝis sur la apron. Li firme kaptis ĝiajn kolharojn per unu mano kaj pikis ĝin en la koro per la akra ponardo. Sekve de tio la apro falis teren kun dolora krio.

Wang estas fama pafisto en tiu loko. Li ĉasadis jam 30 jarojn kaj estas tre sperta en ĉasado de apro, urso, tigro kaj leopardo. Li povas bone escii la movdirekton de bestoj per flarado.

Je la vespera krepusko ni iris rigardi, kiel oni kaptas cervon

Al ĉasado





Ripozeto dum ĉasado

per enfalujo. La enfalujo estis pretigita en somero.

La enfalujo profundas ĉ. 4 m. kaj larĝas je la sama dimensio. La muroj estas tegitaj per lignaj tabuloj kaj sur la fundo estas tavolo da fojno 1 futon dika. Sur la fojno estas reto kun blanka kristalaĵo en la centro. La blanka kristalaĵo estas farita el salo, ŝlimo, salpetro kaj homa urino kaj servas kiel logaĵo por cervo. Oni diras ke ĝi estas pli efika ol la natura salpetro.

Ĉio estis preta. La ĉasistoj kasmuflis la aperturon de la enfalujo. Ili metis lignotabulon sur la foso kaj pendigis ŝnuron sur pinbranĉo kaj metis ankaŭ cervokapon kun du kornoj sur la arbuston apud la kaptilo. La cervokapo estis alvizaĝita al la foso. Vidate de malproksime ĝi tre similas al vircervo staranta en la arbusto.

Leviĝis la luno kaj lumigis la tutan arbaron. Wang ektrumpetis per la cervokorno, kies sono

tre similas al la bleko de cervino.

La atendo estas longa kaj la ĉasistoj devas esti sufiĉe paciencaj.

Finfine el la valo aŭdiĝis obtuza raŭka blekado.

“Jen ili venas!” iu ĉasisto mallaŭte diris kaj tuj ekblovis per la korno.

“U — u —” nigra ombro moviĝis ĉe la rando de la arbaro. Ĝi estis ruĝ-bruna cervo kun grandaj disbranĉigantaj kornoj.

Iu ĉasisto senbrue rampis al la arbusto portante cervokornon.

Denove eksonis la cervokorno en la arbusto. La bruo estis tiel subita, ke la vircervo tuj ekmuĝis. Sed kiam ĝi rimarkis nebulan konturon de cervo ĉe arbustaro, ĝi tuj ekgalopis tien.

“U — u — u —” eksonis tirata sono de cervokorno, kiu estis batalsigno. La cervo tutforte

Singardema ursido



kuregis al la falsa cervo kun la kornoj antaŭen.

“Bum!” renversiĝis la tabulo sur la foso. Falis la vircervo en la enfalujon. Ĉiuj cervinoj sekvantaj ĝin tuj disgalopis pro surpriziĝo.

La kaptita cervo baraktadis kaj muĝadis en la reto. Sed post nelonge ĝi trovis ke ĝi troviĝas en nesto komforta kaj varmeta.

La Ĉina Ŝako

Antaŭ nelonge nia leganto s-ro Gerald Cirrincione skribis al ni, dirante: "Lastatempe, min interesas la ĉinstila ŝako. Mi serĉas librojn pri tiu ĉina tabuloludo. Ĉu oni povas mendi la ĉinstilajn ŝakpecojn kaj ŝaktabulojn? Ankaŭ interesas min la historio kaj evoluo de la ĉina ŝako. Ĉu oni vaste ludas la ĉinan ŝakon en la nuntempa Ĉinio? Kio pri la estonteco?" Kun tiuj demandoj ni petis s-ron Liu Guofu skribi tiun ĉi artikolon.

La Red.

La ĉina ŝako estas unu el la eminentaj naciaj kulturaj heredaĵoj de nia lando. Ĝi havas historion de preskaŭ 1,000 jaroj, ĝis nun ĝi restas populara ludo, per kiu multaj homoj distras sin en la libera tempo.

La pozicioj antaŭkomencaj de la ŝakpecoj de la du rivaloj similas al tiuj de du malamikaj armeoj en antikva milito. La ŝaktabulo estas kvadrato desegnita per 9 vertikalaj kaj 10 horizontalaj linioj. Sur la kruciĝaj

punktoj moviĝas la ŝakpecoj. La spaco inter la kvina kaj la sesa horizontalaj linioj estas nomata "limrivero", kiu rompas 7 el la 9 vertikalaj linioj kaj apartigas la poziciojn en du egalajn flankojn. La spaco inter



KUNSIDO POR KREO DE MODERNAJ DRAMOJ

Por levi la artan nivelon de verkado kaj prezentado de dramoj, la Dua Arta Buroo de la Kultura Ministerio de Ĉinio okazigis lastatempe porverkan kunsidon de siaj dependaj dramaj teatroj.

Unue la dramistoj de la teatroj kunvenis en grupoj. Ili diskutis ĉefe pri la reĝisoraj pozicio kaj rolo en konstruo de sceneja arto. Ili opinias, ke reĝisoro estas ŝlosilo por levi la nivelon de sceneja arto kaj necesas pledi por "havi reĝisoron kiel centron".

La Centra Eksperimenta Drama Teatro diskutis ĉefe pri la problemoj de la vereco kaj tendenchavo de artaj verkoj, pri energia solvo de la problemoj de la arta nivelo de

drama verkado, kaj pri klopodo por modli tipajn figurojn.

La Ĉina Porinfana Teatro diskutis pri la problemoj de temoj, karakterizaĵoj, renovigoj kaj tipomodlado de infanaj dramoj.

Post la grupa diskutado kaj rigardo de kelkaj ĉinaj kaj alilandaj dramoj de aktuala temo, la kunvenantoj interŝanĝis siajn opiniojn. Wu Xue, fama ĉina dramaktoro kaj respondeculo de la buroo, donis parolon en la kunsido.

FILMA PRODUKTADO DE ĈINIO EN 1980

En 1980 Ĉinio produktis 82 rakontajn kaj teatraĵajn filmojn, je 20% pli multe kompare kun tiuj en 1979.

Tiujare Ĉinio havis novan progreson en variigo de temoj kaj formoj de filmoj. Ekz-e, "Tio Okazis en Tianyunshan", "La Duafoja Manpremo", "Nokta Pluvo en Bashan" kaj aliaj filmoj estas alte taksitaj de la spektatoroj.

Ĉinio ankaŭ atingis novajn sukcesojn en verkado kaj produktado de dokumentaj, aktualaj, scienc-educakaj kaj belartaj filmoj.

NOVA ATINGO DE LA ĈINA INTERNA MEDICINO

Dum la pasintaj 30 jaroj la ĉina interna medicino atingis grandajn sukcesojn. Ekz-e, la procentaĵo de la cerb-angia malsano rimarkinde malleviĝis dank' al disvolvo de laboro de la ĝenerala ekzameno, prevento kaj kuraco de hipertensio. La tekniko de senvunda diagnozo pri koronaria kora malsano jam proksimiĝis al la internacia avangarda nivelo. Praktikante terapion en kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, oni multe mallevis la morto-procentaĵon de la akuta miokardia infarkto. Ĉinio rikoltis bonan efikon en uzado de medikamentoj por kora febliĝo. La hoka diagnozo elpensita de Ĉinio pri fruperioda ezofaga kancero havas bonan pozitivan efikon, ebligante al pli multe da ezofagaj kanceruloj daŭre vivi pli ol kvin jarojn post operacio.

la kvara kaj la sesa vertikalaj kaj la unua kaj tria horizontalaj linioj de ambaŭ flankoj, desegnita per du diagonaloj, estas nomata "palaco", en kiu Generalo moviĝas vertikale aŭ horizontale. La 32 ŝakpecoj estas dividitaj en du grupoj: Ruĝa kaj nigra. Ĉiu el la du grupoj estas provizata per 16 ŝakpecoj, nome: 1 Generalo (帥), po 2 eskortantoj (士), elefantoj (象), ĉevaloj (馬), ĉaroj(車), kanonoj (炮) kaj 5 peonoj (卒). Antaŭ ludo ĉiu ŝakpeco sidas sur fiksita loko. Post la lud-komenco ŝakpeco povas ataki la rivalan laŭ sia regula movlinio. Generalo estas komandoro kaj ĉefa celaĵo atakata de la rivalo, ĝia vivo aŭ morto signifas gajnon aŭ perdon de partio, kaj iam ankaŭ aperas egaliĝo.

La ĉina kaj la internacia ŝakoj havas multe da simileco, tamen rimarkindan diferencon. Ekzemple, la ĉinaj ŝakpecoj moviĝas sur 90 kruciĝaj punktoj, dum la internaciaj en 64 kradoj. La ĉinaj peonoj povas moviĝi nur antaŭen kaj ekstermi ŝakpecon de rivalo, sed transirinte la riveron ili povas moviĝi kaj vertikale kaj horizontale. La internaciaj peonoj moviĝas vertikale kaj ekstermas ŝakpecon de rivalo diagonale, kaj atinginte la unuan linion de la rivalo ili povas funkcii kiel alia ŝakpeco laŭ volo de la ŝakisto. La Generalo kaj eskortanto de la ĉina ŝako moviĝas nur en la "palaco", elefanto ne povas transiri la lim-riveron, la ruĝa kaj nigra Generaloj ne rajtas troviĝi sur la sama vertikala linio, sen ŝakpeco inter ili. Pro tio la Generalo de la ĉina ŝako havas povon de fora komando; la reĝo de la internacia ŝako povas libere moviĝi sen ajna limigiteco. La kanono de la ĉina


ŝako saltante ekstermas aŭ atakas nur kiam inter ĝi kaj la atakato ekzistas unu, kaj nur unu ŝakpeco. Manko de movebla ŝakpeco por la ĉina ŝako ĝenerale estas juĝata kiel perdo de la partio, sed por la internacia ŝako kiel devigita "egaliĝo". En la ĉina ŝako la konstanta matigo estas rigardata kiel malvenko, sed en la internacia tio estas permesata kiel peti "egaliĝon". Ambaŭ ŝakoj havas senfine kompleksajn variojn, dum ludo la ŝakistoj povas montri sian saĝon kaj kapablecon plej eble.

Liu Wenzhe, ĉina majstro de la internacia ŝako, venkis Downer, nederlandan grandan majstron de la internacia ŝako en la 23-a Internacia Ŝaka Olimpiko en 1978 per 24 rondiroj, dank' al tio ke li estis eminentulo de la ĉina ŝako, kiu poste ekamis la internacian ŝakon, opiniante ke ambaŭ ŝakoj

havas apartajn karakterojn respektive.

En 1956, la ĉina sporta organizo ekprenis ŝakon kiel oficialan sporton. Ĝis 1980, 11 tutlandaj ŝakaj konkursoj estis okazigitaj. Guangdong-a veterana ŝakisto Yang Guanlin trifoje gajnis ĉampionecon de la ĉina ŝako. Ekde 1960, 15-jara Hu Ronghua 10-foje partoprenis en la tutlanda konkurso kaj gajnis ĉampionecon sinsekve. Kaj en 1980 juna ŝakisto Liu Dahua venkis lin. En ŝakarto ili ambaŭ havas sian apartaĵon. Liu Dahua tre lertas en ŝakludo kaj povas samtempe rivali kun 7-8 ŝakistoj.

La ĉina ŝako interesas vastajn amasojn de ĉinoj. La kulturaj palacoj, geknabaj domoj, parkoj kaj kluboj en multaj provincoj kaj urboj havas siajn ŝakludejojn. La postlaboraj sportaj ler-



Ĉinŝakaj amatoroj rigardas la konkurson.

nejoj de iuj urboj starigis ŝakursojn por trejni junajn ŝakistojn. Kiam la Guangzhou-a Kultura Parko okazigis ŝakturniron inter famaj ŝakistoj, ĉe pluraj partoj de la parko estis pendigitaj dekelkaj grandaj ŝaktabuloj sur kiuj oni metis ŝakpecojn laŭ la telefona informo, kiu allogis iafoje eĉ pli ol 20,000 spektatorojn.

La ĉina ŝako interesas ne nur la enlandajn loĝantojn, sed ankaŭ ĉinajn elmigrintojn, eĉ iujn fremdulojn. En 1916, dano Charles Kliene tradukis la libron "Sep Steloj" pri famaj nefinitaj partioj de la ĉina ŝako en la anglan lingvon kaj rekomendis ĝin al eŭropanoj. En 1937 Karl Gruber tradukis kaj eldonis libron pri parto de duonfinitaj

partioj de la ĉina ŝako en la anglan kaj germanan lingvojn por disvastigi ĝin. En la lastaj jaroj troviĝis amatoroj de la ĉina ŝako en Japanio, Usono, Britio, Aŭstralio, Kanado kaj Nederlando. Iuj el ili starigis koncernajn organizaĵojn. En 1978, iuj belgaj ĉin-ŝakaj amatoroj oficiale starigis Ĉin-ŝakan Asocion kaj telegrafis al Ĉinio, dezirante ke la asocio estos agnoskita de Ĉinio. La Ĉina Ŝaka Asocio tuj telegrame gratulis ĝin.

Konkurso de la ĉina ŝako



Kiel absorbite!



Internacie, ĉefe en sudorienta Azio ĉinŝakaj konkursoj estis okazigitaj multfoje. En 1968, en Singaporo okazis la 1-a Sudorient-Azia Ŝaka Konkurso. Post tio la konkurso havis lokojn en Taiwan-provinco de nia lando, Xianggang (Hongkong), Malajzio, Filipinoj kaj aliaj lokoj respektive. En 1976, ĝi alinomiĝis la 6-a Azia Ŝaka Konkurso kaj okazis en Filipinoj. La 7-a Azia Ŝaka Konkurso estis okazigita en Malajzio.

En decembro de 1980, oni okazigis la 1-an Azian Pokalan Ŝakan Konkurson kaj unuafoje en la ŝaka historio aperis virina konkurso. 18-jara ŝakistino Xie Siming de Beijing gajnis ĉampionecon.

Por rapidigi internaciigon de la ĉina ŝakludo, la Azia Ŝaka Federacio estas diskutanta pri reformo de la ĉinaj ŝakpecoj kaj ŝaktabulo. Oni proponas anstataŭigi la malnovajn ŝakpecojn kun la ideografiaĵoj per tiuj kun desegnaĵoj por kontentigi la fremdajn amatorojn, kiuj ne povoscias la ĉinan lingvon.

* La aŭtoro estas membro de la teknika komitato de la Ĉina Ŝaka Asocio, vicĉefsekretario de la Beijing-a Ŝaka Asocio kaj vicprezidanto de la Juĝa Komitato de BSA.

Pri Ĉina Ŝakludo

de JOOP VAN DER HOEVEN
(Nederlando)

NU, tio, kion ni havas en la manoj, estas la ĉina elefant-ŝakludo. Estas la formo kiun la malnova hinda ŝakludo alprenis post longa vojaĝo al la oriento. Nia ŝakludo estas la okcidenta branĉo, la ĉina ŝako estas la orienta branĉo. La ĉina ŝakludo havas varianton: la korea ŝako. Vidinte kelkajn sufiĉe grandajn diferencojn, ni miras ĉu similecoj estas troveblaj inter “oriento” kaj “okcidento”. Jes! Kelkaj pecoj havas similan aŭ preskaŭ similan funkcion. Sur la anguloj de la batalejo troviĝas la “ĉaro” (車) Tiu peco staras sur la sama loko kiel la turo kaj, ĝuste kiel la turo, moviĝas laŭ rektaj linioj, kaj horizontale kaj vertikale. Ĝia forto estas la sama: ĉio kio opozicias al la ĉaro povas esti forbatita de la batalejo en unu movo. La peco apud la ĉaro estas la ĉevalo (馬), ĝuste kiel “ĉe ni”. Kun iom da fantazio ni divenas ke ni rekonas ĉevalkruron, dekstre sube. La elemento “4” estas klare videbla. La ĉina ĉevalo moviĝas same kiel ĝia okcidenta frato, laŭ la principo: “unu rekte, unu oblikve”. Nur saltante ĝi ne estas tiel lerta kiel la okcidenta. La okcidenta ĉevalo saltas, tio estas ĝia privilegio, super ĉiuj pecoj. Sed se troviĝas rekte antaŭ la ĉina ĉevalo peco, tiam tiu peco kvazaŭ krias: “Haltu! Viaj kruroj estas blokditaj!” Tiam la ĉevalo povas almenaŭ salti malantaŭen aŭ flanken, sed la antaŭa direkto estas tabua! Apud la ĉevalo ni renkontas la elefanton, kiu moviĝas nur oblikve kaj eĉ tiam nur laŭ la

fiksita limigita maniero. Ĉar post du movoj antaŭen, ĝi ne povas iri plu pro la rivero kiu troviĝas inter la tabulduonoj. Nun ni komprenas ke la elefanto estas pure defensiva. Kune kun la kolego ĝi konsistigas pezan barikadon kiu ekranumas la internan parton nomitan “la kastelo”. En tiu kastelo vivas la Generalo kun ties du korteganoj. Ne estas permesate al iu ajn el la tri forlasi la kastelon. Triope ili devas resti kaj ne cedi, sur 9 punktoj. Furiozajn saltojn oni do ne atendu. La Generalo paŝas digne, paŝon post paŝo, ĉu antaŭen, ĉu flanken. La korteganoj estas liaj subuloj kompletaj. Ili moviĝas nur oblikve, paŝon post paŝo. Ilia plej alta celo estas ĵeti la korpon antaŭ la Generalon, kiel lastan defendon. En bona reciproka harmonio ili faras verajn heroaĵojn en la mortospito kiu estas deca por subulo.

La plej granda surprizo de la ĉina ŝako devas ankoraŭ veni por la novulo. Mezvoje de la batalejoj staras du vivo-veraj kanonoj! Estas eksterordinare malmoralaj pecoj, kiuj super la kapo de alia peco kiu estas starigita sur la sama linio, faljetas sin sur nenion-atendantan malamikon. Paraŝutistoj!


Aŭ ĉu ni rekonu ekzemplon de malnova ĉina arto, nome fari piroteknikaĵojn? Ekzistas ŝakludantoj kiuj opinias ke la kanono estas tro surpriza aŭ tro malnobla. Ververe ĝi bombas super alia peco kaj do misuzas tiun pecon por detruo aliloke ...

La antaŭgvardio estas formita el 5 soldatoj, nomitaj “Bing” (兵). (Bing ‘兵’ en la senco egalas al Zu ‘卒’.) Ili ekmarŝas. Ili ne rajtas cedi la vojon, ĝuste kiel la okcidentaj peonoj. Antaŭen aŭ morti atendi. Feliĉe la ĉina peono havas pli bonan sorton ol nia peono. Ĉar tuj kiam Bing transpasis la riveron, li libere vagadas — li rajtas iri antaŭen, dekstren, maldekstren. Li fariĝas vera perforta rabisto! Nur la malantaŭa direkto estas malpermesita por li ...

Lasta diferenco inter la du ŝakmanieroj: Tipe ĉina karakterizaĵo: la du generaloj “ne rajtas rigardi en la okulojn, unu la alian”. Tiel la ĉina regulo. En okcidenta lingvo: la du generaloj ne rajtas troviĝi sur la sama vertikala linio, sen peco kiu troviĝas inter ili. Tiel la generalo de sia limigita spaco tamen influas la pozicion transe de la “tabulo”, kaj liaj okuloj enpenetras la koron de la malamika defendo ...

Jen la rakonto pri ĉina ŝako, kiel ĝi estas vidata tra la okuloj de okcidenta ŝakludanto. La ĉina ludo estas plena je surprizoj kaj tre vigla. Estus rekomendinda vario en nia ludŝablono.

La ĉina ŝaktabulo



SPORTAJ NOVAĴOJ DE ĈINIO EN 1980

En la ĉina ĵurnalo "Tiyu Bao" (Sporto) estas publikigitaj jenaj dek gravaj sportaj novaĵoj de 1980:

1. Ĉinaj geskiistoj kaj gesketistoj unuafoje partoprenis en la Vintraj Olimpikoj, post kiam la Internacia Olimpika Komitato restarigis la leĝan sidlokon de la Ĉina Olimpika Komitato.

2. La ĉinaj gesportistoj rifuzis partopreni en la 13-aj Olimpikoj.

3. Ĉina volanisto Han Jian venkis la mondan volanistan reĝon — indonezian volaniston Liem Swie King en la turniro.

4. Ĉinaj getablotenisistoj havis plezuratan paroladon kun la samlandanoj en Taoyuan-aerodromo, Taiwan. Ĉinaj geatletoj partoprenis en konkurso okazigita en Usono kune kun Taiwan-aj kolegoj.

5. Atleto Hu Zurong, kiu paralizigis antaŭ 9 jaroj, ricevis "honoran sportan medalon" pro sia diligenta verkado.

6. Ĉinaj getablotenisistoj partoprenis en 11 gravaj internaciaj turniroj kaj akiris ĉiujn teamajn ĉampionecojn virajn kaj virinajn. En la unua mondpokala vira solludo, en kiu partoprenis 16 mondfamaj sportistoj, ĉinaj tablotenisistoj Guo Yuehua kaj Li Zhenshi gajnis la unuan kaj duan lokojn respektive.

7. En la ŝakludo junaj ludistoj venkis la veteranajn. Hu Ronghua, la ĉampiono de 10 sinsekvaj tutlandaj konkursoj, degradiĝis en B-grupon.

8. En la Azia Virina Korbopilka Ĉampioneca Turniro la ĉina teamo perdis la ludon al la teamo de la Suda Koreio je 33 poentoj.

9. La ĉinaj gegimnastoj gajnis 2 orajn, 1 arĝentan kaj 2 kuprajn medalojn en mondnivela konkurso.

10. Ĉinio unuafoje grandskale esploris la regulon de kreskado de la geknaboj kaj faris ekzamenon kaj mezuron al 249,000 geknaboj pri la korpaj staturaj funkcioj kaj kvalito.

KNABINO FARIĜIS MAJSTRO

La ĉina 19-jara knabino Liu Shilan estis nomita majstro de internacia ŝako. De la 12-a ĝis la 25-a de decembro, 1980, okazis la Tria Virina Invita Turniro de Internacia Ŝako de Novi Sad, en kiu partoprenis 12 ŝakistinoj de Jugoslavio, Pollando, Kubo, Hungario, Rumanio kaj Ĉinio. Liu Shilan estis honorita kiel majstro pro sia brila sukceso kaj gajnis la trian lokon en la turniro.

MIAO MIN — ĈAMPIONO DE SKETKURO

La ĉina 20-jara sketistino Miao Min gajnis ĉampionecon per 1'26"90 en la 1000-metra sketkuro en la Azia Virina Sketkura Konkurso, kiu okazis en Japanio la 19-an de decembro 1980.

BREMEN-A INTERNACIA VIRINA FLUGPILKA KONKURSO

De la 2-a ĝis la 6-a de januaro, 1981 okazis la Dua Bremen-a Internacia Virina Flugpilka Konkurso en FR Germanio, en kiu partoprenis la teamoj de Ĉinio, Kubo, FR Germanio, Brazilo kaj Belgio. La ĉina virina teamo per venkoj en ĉiuj kvar maĉoj gajnis la ĉampionecon.

XIAO FENG:

Simon

LA 17-a de decembro 1980 estis la 150-a datreveno de la forpaso de Simon Bolivar, famkonata gvidanto de la Latin-Amerika nacia sendependa movado. Memore al tiu elstara heroo, diversrondaj personoj de Beijing (Pekino) okazigis kunvenon kaj la Ĉina Junula Arta Teatro prezentis la dramon "Montserrat".

Simon Bolivar naskiĝis en 1783 en Venezuelo. Por batali kontraŭ la hispanaj koloniistoj kaj por la nacia sendependeco de Latin-Ameriko, li partoprenis en 472 bataloj kaj dediĉis sian tutan vivon. Sub lia gvido la venezuela popolo kaj la patriotaj fortoj de aliaj Latin-Amerikaj landoj faris longan sangan batalon kontraŭ la malamikoj kaj liberigis unu post alia Venezuelon, Kolombion, Ekvadoron, Peruon kaj Bolivion. La venezuela popolo donis al li la titolon "Patro de la Lando". Kolombio, Ekvadoro kaj Peruo honoris lin per "liberiganto". Bolivio prenis lian nomon kiel sian land-nomon, kaj pluraj ĉefurboj de Latin-Amerikaj landoj konstruis por li monumentojn kaj statuojn.

En la fino de la 15-a jarcento plejparto de Latin-Ameriko fariĝis kolonio de Hispanio. Dum la 300-jara kolonia regado la tieaj popoloj multe suferis de kruela subpremado kaj sklavigado. En la fino de la 18-a jc. kaj la komenco de la 19-a jc. la popoloj de Latin-Ameriko kovis

Bolivar—Nacia Heroo de Latin-Ameriko

liberigan movadon por sendependeco kaj suriris la vojon de revolucia milito.

En sia juneco, kiam Bolivar studis en Eŭropo, li estis influita de la burĝara revolucio de Francio kaj tiel ekhavis fortan nacian konscion kaj patriotismon kontraŭ la kolonia regado. En 1806, nelonge post kiam li informiĝis en Eŭropo pri fiasko de batalo de la venezuela popolo gvidata de Francisco de Miranda, li revenis al sia patrolando kaj komencis siajn revoluciajn aktivecojn por la liberigo de la patrolando.

Tiam en Venezuelo troviĝis multaj homoj, kiuj estis malkontentaj pri la kolonia regado, nur esperis iajn cedojn kaj reformojn fare de la koloniaj instancoj. Bolivar insistis pri disrompo de la koloniaj katenoj kaj efektivigo de nacia sendependeco. Li multfoje fiaskis, sed li senŝanceliĝe persistis en la batalo.

En aprilo de 1810 li gvidis la insurekcion de la karakasa popolo kaj fondis la Venezuelan Respublikon en la 7-a de julio. Sed la nova reĝimo suferis reatakon de la restanta kolonia armeo kaj estis renversita en marto de 1812. En marto de 1813 Bolivar faris refojan atakon kaj liberigis Karakason en aŭgusto de la sama jaro, kaj tiel fondiĝis la Dua Venezuela Respubliko. Sed, post malpli ol unu jaro la kolonia armeo refoje renversis

la respublikon. En 1816, subtenate de Petion, la negra gvidanto de Haitio, la ekspedicio organizita de li surteriĝis ĉe marbordo en la nordorienta parto de Venezuelo. Tamen pro manko de helpo de la popolo lia unua batalo estis perdita. Post kelkaj monatoj la ekspedicio organizita de li en Haitio refoje surteriĝis kaj okupis la urbon kiu nun nomiĝas Bolivar. Tie troviĝis vastaj tropikaj arbaroj, tre favoraj por manovrado de patriotaj fortoj. Tie Bolivar mobilizis popolanojn, ekspansigis la insurekcian armeon kaj starigis bazlokon. En la 15-a de februaro de 1819 fondiĝis la Tria Venezuela Respubliko.


En 1819, Bolivar kaj liaj insurgentoj marŝis tra primitivaj arbaroj kaj la neĝkovritaj Andoj, eniris Kolombion kie troviĝis potencaj revoluciaj fortoj kaj fine liberigis Bogoton. Unu jaron poste la insurgentoj returnis sin al Karakaso kaj liberigis la tutan Venezuelon en 1822 kaj Ekvadoron poste. Por frakasi la lastan fortikajon de la kolonia armeo en Peruo, la insurgentoj venke persekutis la malamikojn, gajnis la tutan militon en decembro de 1824 kaj liberigis Peruon, tiel ke la tuta Sud-Ameriko forskuis de si la jugon de la hispanaj koloniistoj.

Post la fondiĝo de la Tria Respubliko Bolivar abolis la sklavecon, konfiskis la teron kaj posedaĵojn de hispanaj koloniis-

toj kaj reakciaj nobeloj, bienuoj kaj eklezioj, kaj distribuis la teron al la revoluciaj batalantoj. Tiuj rimedoj rikoltis subtenon de vastaj popolamasoj, tial la revoluciaj fortoj grandiĝis tagon post tago kaj senĉese venkis en la batalo.

En la batalo kontraŭ la regado de hispanaj koloniistoj, Bolivar resumis la sperton pri la unuigita naciŝava batalo de Latin-Ameriko. Li diris: “Por ni, Ameriko estas nia patrolando”, “nia standardo estas sendependeco kaj libereco”, “ni devas senĉese batali ĝis kiam la tuta Sud-Ameriko liberiĝos el sub despota regado de hispanaj koloniistoj”. Li emfazis, ke la Latin-Amerikaj landoj, kiuj havas komunan devenon kaj sa-

Statuo de Simon Bolivar



majn suferojn, devas firme unuigi kaj subteni unu alian por rezisti deeksteran agreson. Tiu brila penso de Bolivar estas heredata de la popolo de tiuj landoj.

La sendependigintaj landoj de Latin-Ameriko frontis la danĝeron, ke la britaj kaj usonaj koloniistoj klopodis enpenetri en ilin. Bolivar estis akre singardema kontraŭ tio. En 1823, li firme oponis, ke oni fondu "Union de Respublikoj de Hispanio-Ameriko" kun Britio kiel la ĉefo. Li avertis, ke "post kiam Britio fariĝos la mastro de la unio, ni fariĝos ĝiaj sklavoj". Li montris en 1824, ke Usono "intencas meti Sud-Amerikon en mizeran staton sub la ŝildo de libereco". Kiam la malnovaj koloniistoj estis baldaŭ falontaj, li tenis altan singardemon kontraŭ la danĝero de invado de nov-koloniismaj fortoj. Tiuj liaj antaŭvidoj hodiaŭ ankoraŭ restas instruaj al la popoloj de Latin-Ameriko.

En 1830, 47-jara Bolivar mortis de malsano en Kolombio. En 1842 la venezuela parlamento decidis transloki lian restaĵon en la centran preĝejon de Karakaso.

Dum la 150 jaroj depost la forpaso de Bolivar la naciliberiga movado de Latin-Ameriko multe disvolviĝis kaj la batalo daŭras. Hodiaŭ, antaŭ la popoloj de Latin-Ameriko prezentiĝas malfacila tasko batali kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo, kaj konduki la demokratian revolucion ĝis la fino. Pro tio, la nomo de Bolivar, kiel simbolo de sendependeco de Latin-Ameriko, daŭre kuraĝigas la tieajn popolojn por gajno kaj defendo de nacia sendependeco.



KIAM mi finis mian mallongan viziton al Hungario kaj forveturis de tiu bela lando, ĉiaj impresoj akiritaj en tiuj malmultaj tagoj reaperis en mia cerbo, kaj la plej emocia el ili estas la amikeco konservita en la koro de tieaj polanoj.

En tiu tago, kondukate de Radovits Ferenc, estro de la Ensemblo de la Popola Armeo de Hungario, mi eniris simplan grizan domon, trapasis lian kabineton kaj venis en longan mallarĝan ĉambron, kiu servis kiel kunvenejo kaj akceptejo. En la murŝrankoj antaŭ ni ekspoziciis diversaj valoraj donacaĵoj ricevita dum la vizitado de la ensemblo al 42 landoj en la lastaj 31 jaroj. Sur okulfrapaj lokoj montriĝis kloronea florvazego kaj ajura eburglobo donacitaj de nia lando, okaze de ĝia vizito en 1956. "Kiom da tavoloj tiu eburglobo havas?" mi demandis. "Naŭ," respondis la apude staranta Zsido Ferenc, sekretario de la partia komitato, tiel rapide kaj kun tia certeco ke mi supozis, ke li certe vizitis Ĉinion antaŭ 25 jaroj. Li, tiutempa ĥorano, diris al mi, ke restas en la ensemblo nur 12 el liaj kunvizitantoj.

Veninte en la ekzercan ĉambron de la vira ĥoro, pli ol 50 membroj provludis tie programerojn por baldaŭa prezentado. Jen stariĝis mezaĝa viro kiel gvidanta kantisto de ĥorajo pri la vivo de soldatoj. Lin montrante la estro de la ensemblo

Amikeco en la koro

— Vizito al la Ensemblo de la Popola Armeo de Hungario

de HUANG BINGJUN

flustris al mi: "Li ankoraŭ ne estis solisto, kiam li vizitis Shanghai."


"Ĉu iuj aliaj el ili vizitis Ĉinion?" mi demandis la estron de la ensemblo. La direktisto de la ĥoro Podor Bela staranta antaŭ mi ŝajne komprenis mian demandon, returnis sian kapon kaj respondis: "Baldaŭ vi vidos ilin." Je levo de lia taktobastono, tuj stariĝis 9 viroj kun aĝo de ĉ. 50 jaroj.

"Ĉi-ĉa ĉi-ĉa ŭomen laŭbajŝing (ni popolanoj)... " Ili ekkantis en la ĉina lingvo. Kvankam dum almenaŭ 20 jaroj ili ne kantis tiun kanton, tamen, ili ankoraŭ povis tiel klare ĝin kanti kun profunda sento. Estas videble, ke ili ĉiam konservis tiun kanton en sia memoro.

Post la kantado mi pretervole aliris kaj manpremis kun ili por danki ilian amikecon al la ĉina popolo.

La direktisto kun hararo jam blankiĝinta elpoŝigis foton faritan okaze de ilia vizito al fabriko en Shanghai. Li montris al mi ĉiujn personojn en la foto. Li ankaŭ diris al mi, ke en lia hejmo estas "ĉina muro" kun fotoj kaj aliaj memorajoj el Ĉinio.

Mi ne havis ŝancon por rigardi la "ĉinan muron" en lia hejmo, tamen mi vidis "ĉinan ĉambron" en la hejmo de alia hungara amiko, kiu iam laboris en Ĉinio. En la ĉambro



La nacimuzika trupo de la Ensemblo de la Popola Armeo de Hungario

kun areo de 12 kvadrataj metroj pendis palaca lanterno de la plafono kaj ferbildoj sur muroj, en vitrino estis konservataj porcelanaĵoj kaj aliaj metiartaĵoj, kaj surplanke sterniĝis tapiŝo — ili ĉiuj estis produktoj el Ĉinio. Ĉiuj objektoj en la ĉambro povas rememorigi la mastron pri liaj neforgeseblaj tagoj travivitaj en Ĉinio.

Adiaŭinte tiujn malnovajn ami-

kojn, mi venis en la ekzercejon de la danca grupo. Subite venis al mi mezaĝa virino kun brile ruĝa surtuto sur la ŝultroj kaj diris al mi senerare en la ĉina lingvo: “Mi estas membro de la Ensemblo de la Popola Armeo de Hungario.” Ŝi estis siatempe dancistino kaj juna knabino. Hodiaŭ ŝi jam fariĝis instruistino de la danca grupo. Ŝi traktis min kiel malnovan intimulon kaj

plurfoje diris ke estas neforgeseblaj por ŝi tiuj tagoj pasigitaj de ŝi en Ĉinio.

Radovits Ferenc kaj la arta direktisto G. Gyorgy, kiuj akompanis min, rakontis al mi kortuŝan okazaĵon en Ĉinio dum la vizito de la ensemblo. Kiam la ensemblo envenis Ĉinion, la vetero frostiĝis kaj mankis al la membroj vintraj vestoj. Kaj ĉiu el ili ricevis ledsurtuton dum sia vizito al ledfabriko. . . Ili rakontis tiel detale kaj vivece, kva-zaŭ ili persone tion travivus. Sed poste mi informiĝis kun miro ke ili aliĝis al la ensemblo nur post ĝia vizito. La arta direktisto diris, ke tio ne estas mirinda ĉar neforgesebla estas tiu vizito de la ensemblo al Ĉinio kaj multaj amikaj anekdotoj pri ĝi estis longe cirkulantaj en la ensemblo.

Jam estis tempo por adiaŭo, tamen neniu el ni volis disiĝi. Mi komencis foliumi malnovajn numerojn de la ĉina Popola Ĵurnalo kaj aliaj ĉinaj provincaj ĵurnaloj antaŭ mi, en kiuj aperis informoj kaj artikoloj pri la aktivadoj de la ensemblo en Ĉinio. Unu el iliaj titoloj estis “Eminenta Arto, Profunda Amikeco”. Vere, la amikeco semita profunde en la koron antaŭ 25 jaroj eltenis la provadon de tempo kaj prujno. Ĝi certe en iu tago ĝermos el la tero kaj donos belajn florojn.

Danco de la Ensemblo de la Popola Armeo de Hungario





EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

CAI XIANSHENG:

Ekskurso *de*



Turistoj piknikas en tendo en Norpu Lingka.

tibetanoj al antaŭurba pitoreskejo

LA tibetanoj aparte ŝatas ekskursi al antaŭurba pitoreskejo kaj havi tie piknikon.

En printempo, kiam la tero ve-kiĝas kaj la salikoj burĝonas, la tibetanoj komencas iri al ĝardenoj. Iia ekskursado daŭras ĝis profunda aŭtuno. En tiu longa tempo ĉiam troviĝas ekskursantoj en kaj ekster la urbo Lhasa. Precipe frumatene de ferioj kaj festotagoj, homoj el ĉiuj stratoj fluas al la ĝardenoj Norpu kaj Nixue kaj al la lago Draka Reĝo kaj la Kultura Palaco de Laboruloj. La gemaljunuloj ĝojplenaj en novaj lanvestoj kaj botoj, portante ladbotelojn plenajn de sekalvino kaj termosojn kun butera tero, iras en la fronto. Junuloj direktas biciklojn kaj varĉarojn, sur kiuj me-tiĝas tapiŝoj, lankusenoj kaj tendoj. Iuj el ili portas dorse seskordan muzikilon. Kaj arope iras ridantaj knabinoj en longa tibeta jupo kaj kun longaj harligoj ornamitaj per buntaj silkaj fadenoj.

Kiam matena sunlumo trapene-tras densan arbaron, oni starigas siajn tendojn sur verdaj herbejoj, sub altaj poploj kaj antikvaj salikoj. Sidante sur tapiŝo aŭ plasta tuko en la tendoj kaj malantaŭ la kurtenoj apud vojo, oni trinkas sekalvinon, buteran teon kaj jahurton kaj frandas fromaĝon kaj aliajn kukojn. Iom poste, leviĝas muziko kaj kantado. Super la tuta ĝardeno sonoras antikvaj tibetaj polkantoj kaj popularaj tibetaj operoj. Dancas kaj kantas la gejunuloj kaj gemaljunuloj, de mateno ĝis posttagmezo.

Estas alia formo de ekskurso. En varmegaj someraj tagoj, iuj ŝatas lavi vestojn, ŝtrumpojn kaj ŝuojn ĉe rivereto. Laciĝinte, ili kuŝiĝas sur herbejo kun la membroj sternitaj, aŭ sidiĝas sub antikva arbo manĝante kukon. Tiel ili ĝuas lirlon de akvo ĝis sunsubiro.

Tia ekskurso de tibetanoj kun loka koloro havas historion de ĉ.

300 jaroj. Inter la 1-a kaj la 15-a de la kvina monato laŭ la tibeta kalendaro en ĉiu pasinta jaro, kiam prosperis arboj kaj floroj en la antaŭurbo de Lhasa, oni ekskursis kune kun siaj familianoj aŭ kun siaj parencoj, amikoj aŭ najbaroj. Krom pikniko, ili havis ankaŭ programerojn. Kiam tio kulminis en la 15-a de tiu monato, oni ankaŭ aranĝis sorĉistan dancon kaj aliajn religiajn aktivadojn.

Tia ekskurso furoras ne nur en Lhasa, sed ankaŭ en Xigaze, Qabdo kaj aliaj lokoj. Cirkulas en Xigaze malnova legendo: Antaŭ tagiĝo de iu bela printempa tago la viroj de Xigaze azenrajdis al la monto en ĝia malproksima antaŭurbo por pilgrimi al Lotus-budho. Dume la virinoj kaj infanoj, kunportante kurtenojn kaj manĝaĵojn, iris al la antaŭurbo kaj tie incensis por bonvenigi la pilgrimantojn. Ekvidinte siajn karulojn revenantaj, la virinoj kaj infanoj ĝoje alkuris al ili kaj

tiris ilin al ĝardeno por festi la beniĝon. Tio okazis ĉiujare kaj formis plej fruan ekskurson al ĝardeno en Xigaze. Poste ĝi daŭre disvolviĝis. Kiam la pilgrimintoj iris returne, ili konkursis pri azenrajdo. Kaj en la nuntempo tia aktivado disvolviĝis en ĉeval-konkurson kaj konkurson de sagpafado.

En Qabdo k.a. de orienta Tibeto kreskas densaj primitivaj arbaroj, tial en la someraj tagoj la urbanoj kaj vilaĝanoj piediras aŭ per ĉeval-

ĉaro veturas unu aŭ du tagoin al arbaro por tie somerumi. Tiamaniere ili faras sian ekskurson.

Tia aktivado havas intiman rilaton kun la apartaj naturaj kondiĉoj de la Tibeta Altebenaĵo. Tibeto situas en alta kaj malvarma zono, kie vintro daŭras duonjaron. En multaj lokoj estas kalvaj montoj. Tial, kiam vekigās la tero en printempo, tiuj, kiuj longe restas hejme, sopiras nature al ĝardeno kun densaj arboj kaj freŝaj herboj por sin li-

berigi de sufokiĝo. Kaj iom post iom formiĝis ilia kutimo de ekskursado.

Sed, en la tagoj, kiam la servutuloj estis subpremataj, rajtis somerumi nur la sklavoposedantoj, burokratoj, egkomercistoj kaj aliaj riĉuloj. Hodiaŭ la ekskurso jam fariĝis nemalhavebla por la vivo de la liberigitaj servutuloj. Ankaŭ nemalmultaj alilokanoj partoprenas en la plezuro de la tibetanoj.

Geinstruistoj de la Unua Elementa Lernejo de Lhasa ĝoje pasigas siajn feriojn sur gazono de Norpu Lingka.



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

La fondiĝo de la Kuomintang-a registaro

de TANG BAOLIN

POST la malvenko de la ĉina revolucio en 1927, la novaj kaj malnovaj militaristoj, subtenate de siaj imperiistoj-mastroj, komencis novan separatismom kaj bataladon unu kontraŭ alia.

BATALO INTER NOVAJ MILITARISTOJ

En julio de 1927 aperis du Kuomintangaj registaroj en suda Ĉinio, nome la Nanjing-a registaro kun

Jiang Jieshi (Ĉiang Kajsek) kiel la ĉefo kaj la Wuhan-a registaro regata de Wang Jingwei. Krome, troviĝis Guangxi-a militaristo Li Zongren subtenanta Jiang. En norda Ĉinio estis la Beijing-a registaro tenata de

malnova militaristo Zhang Zuolin favorata de la japana imperiismo kaj praktikanta separatismen en norda kaj nordorienta Ĉinio. Troviĝis ankaŭ militaristo Yan Xishan en Shanxi (Ŝanĥi)-provinco kaj militaristo Feng Yuxiang en nordokcidenta Ĉinio, kiu kunlaboris poste kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj kontribuis por la ĉina revolucio.

Iris akraj politikaj bataloj kaj militaj konfliktoj inter Wang Jingwei kaj Jiang Jieshi por la gvidantecco de Kuomintango. Fine Wang kaj lia registaro falis en malvenko. Ekde februaro de 1928 Jiang Jieshi monopoligis la militan kaj politikan potencojn de la Kuomintanga Nanjing-a registaro.

Aprile de 1928 Jiang Jieshi, en kunago kun militaristoj Li Zongren, Feng Yuxiang kaj Yan Xishan, faris ekspedicion kontraŭ Zhang Zuolin, konkeris Bejĝing en junio kaj elpelis liajn fortojn el norda Ĉinio. Ĉar Zhang ne kontentigis la postulon de la japana imperiismo pri anekso de nordorienta Ĉinio, li estis mortigita de japana trupo per dinamito submetita sur lia vojo al nordorienta Ĉinio. Antaŭ la fortoj de la japana imperiismo, Jiang Jieshi ne kuraĝis daŭrigi sian marŝon al nordorienta Ĉinio kaj sin turnis al utiligo de la kontraŭdiro inter Japanio kaj Zhang Xueliang, filo de Zhang Zuolin. Dank' al la pacigo de la usona ambasadoro en Ĉinio, Jiang Jieshi obeigis Zhang Xueliang al la Nanjing-a registaro. Kaj tiam aperis en Ĉinio situacio de portempa unueco.

En januaro de 1929, je preteksto de malarmado, Jiang Jieshi intencis malgrandigi la armitajn fortojn de ĉiuj aliaj militaristoj por pluapaŝe firmigi sian aŭtokration. Sed lia intenco trafis ilian oponon. Sekve Jiang rekomencis novan militagadon. Jiang levis ekspedicion kontraŭ Li Zongren en marto kaj kontraŭ Feng Yuxiang en oktobro. La sekvantan aprilon iris arda batalo inter la trupoj de Jiang kaj la unuigita armeo de Feng kaj Yan, kaj Jiang venkis siajn rivalojn. Li ne nur

militis kontraŭ siaj politikaj kontraŭuloj, sed ankaŭ semis malakordon inter ili aŭ per granda monsumo subaĉetis ilin, kaj tiamaniere frakasis ilin aparte. Lian rapidan venkon oni ŝuldis al liaj multegaj trupoj kaj, pli grave, al la grandaj milita kaj ekonomia helpoj de la usona imperiismo.

NOVA KOMPRADORO DE IMPERIISMO

Post sia fondiĝo la Nanjing-a registaro ne ŝanĝis la duonkolonian pozicion de Ĉinio, kaj same servis kiel agente de imperiismo en ĝiaj subpremado kaj ekspluatado al la ĉina popolo. En diplomatio ĝi agnoskis ĉiujn neegalajn traktatojn subskribitajn de la antaŭaj ĉinaj registaroj kaj imperiismaj landoj kaj entreprenis diplomaciajn agadojn humiligantajn la nacion kaj perfidantajn ĝiajn suverenajn rajtojn. En ekonomio ĝi servis kiel lojala kompradoro de imperiismo.

Kiel ĉiuj scias, en 1929 okazis en la kapitalisma mondo serioza ekonomia krizo, kiu daŭris tri jarojn. Por sia eliro la imperiistoj prenis Ĉinion kiel lokon por deturni sian krizon. Inter 1928 kaj 1931, la imperiismaj landoj dumpingis grandan kvanton da siaj superfluaĵaj produktaĵoj al la ĉina merkato, kio sufokis la nacian industrion de Ĉinio kaj bankrotigis ĝian kamparan ekonomion.

Kiel registrite, ĉiujare antaŭ 1928 la malfavora saldo de komerco de Ĉinio estis maksimume 300 milionoj da juanoj, sed en 1931 ĝi kreskis ĝis 816 milionoj da juanoj. En 1914 la totala sumo de investo de imperiismaj landoj en Ĉinio estis pli ol 1.61 miliardoj da dolaroj, en 1931 ĝi kreskis ĝis 3.2 miliardoj da dolaroj kaj en 1936 leviĝis ĝis 4.285 miliardoj da dolaroj. El tiu sumo la japana investo konsistigis du trionojn. En 1931 la fervojo, kiun la fremdlandaj kapitalistoj mastrumis kaj regis en Ĉinio, konsistigis 84.3% de la totala longeco de la ĉinaj fervojoj, kaj en 1937—90.7%. La

fremdlandaj ŝipoj tenis 82.8% de la totala tonelaro en la navigacio en Changjiang (Jangzi)-rivero. La spindeloj de la tekstilaj fabrikoj, kiujn la fremdlandaj komercistoj administris en Ĉinio, konsistigis 46.2% de la totala kvanto de la spindeloj de Ĉinio, kaj iliaj teksmaŝinoj—56.4% de la totala kvanto de la teksmaŝinoj en Ĉinio. En 1929 la Shanghai-a Elektra Kompanio, la plej granda en Ĉinio, fariĝis posedajo de la financa grupo de Rockefeller de Usono. Kaj 99% de la ĉinaj ferminejoj estis monopoligitaj de Japanio.

Ĉar la prousona grupo—Jiang Jieshi kaj liaj kunuloj Song Ziwen kaj Kong Xiangxi (ambaŭ funkciis iam kiel financa ministro)—tenis la potencon de la Nanjing-a registaro, la usonaj ekonomiaj fortoj kreskis rapide en Ĉinio, usonaj konsilantoj laboris en iuj gravaj departementoj de la Nanjing-a registaro kaj Usono regis ĝenerale ĝian ekonomion per investo kaj granda pruntedono. La kresko de la usonaj ekonomiaj fortoj en Ĉinio akiris la kontraŭdiron inter Japanio unuflanke kaj Usono kaj Jiang aliflanke, kio estis unu el la kaŭzoj kial Japanio lanĉis poste agresan militon kontraŭ Ĉinio.

FASISMA REGADO KAJ KRUELA EKSPLUATADO

La Nanjing-a registaro de Jiang Jieshi foje-foje lanĉis grandskalajn militajn "ĉirkaŭekstermojn" kontraŭ la bazlokoj de la Komunista Partio, faris bruligojn, mortigojn kaj rabojn kaj praktikis spionan terorismen kontraŭ la popolo en la regionoj regataj de Kuomintango.

En ekonomio la kvar grandaj monopolaj kapitalistaj grupoj kun Jiang Jieshi kiel ĉefo praktikis senprecedencan rabon kontraŭ la ĉina popolo. Kaj tiu rabo karakteriziĝis per tio, ke per siaj milita kaj politika potencoj, ili koluziis kun imperiismo, monopoligis la monajn aferojn, la industriajn kaj komercajn entreprenojn kaj ĉiujn aliajn ekonomiajn kampojn kaj formis

grandegan monopolan burokrat-kapitalistan grupon. En 1936 la kapitalo de la kvar grandaj bankoj en iliaj manoj konsistigis 59% de la totala kapitalo de la ĉinaj bankoj, kaj la biletoj emisiitaj de ili — 78%.

La kvar kapitalistaj grupoj alprenis ĉefe la jenajn rimedojn por rabo de riĉaĵoj: Unu estis prunti monon de fremdlandanoj. Sole la t.n. "kotona kaj tritika pruntoj" prenitaj el Usono atingis 20 milionojn da dolaroj. Alia estis senbride emisii obligaciojn. En 1927 estis emisiitaj nur du specoj de obligacioj kun valoro de 70 milionoj da juanoj, kaj en 1931 jam estis sep specoj kun valoro de 466 milionoj da juanoj. La tria estis kolekti multegajn impostojn de la popolo. En la 30-aj jaroj la Nanjing-a registaro postulis multspecajn impostojn kaj monoferojn, kiaj aperis neniam antaŭe. Sole la kromterimposto, kiun ĝi kolektis de la kamparanoj, estis

kelkoble, eĉ dekoble pli multa ol la terimposto mem.

La ĉina popolo vivis tre mizeran vivon pro subpremado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo. Laŭ nekompleta statistiko, sole en 1930, 500,000 laboristoj perdis sian okupon; precipe al la vasta kamparanaro mankis greno kaj vestoj, kaj kiam okazis natura katastrofo, miloj kaj dekmiloj da kamparanoj mortis de malsato. En 1929 kaj 1930 sole en la ses provincoj en sudokcidenta Ĉinio mortis de malsato 16.2 milionoj da homoj. Krome, la Kuomintang-a regado grave damaĝis la interesojn de la nacia burĝaro, kies entreprenoj bankrotadis pro la rabado kaj subpremado fare de la imperiistoj kaj la kvar grandaj kapitalistaj grupoj. Laŭ la informo de la Nanjing-a registaro, en 1928 la novaj fabrikoj registritaj ĉe la registaro estis 250 kun kapitalo de pli ol 117.84 milionoj da

juanoj, kaj en 1931 sin registris ĉe la registaro nur 113 fabrikoj kun kapitalo de 27.69 milionoj da juanoj, t. e. je 76.5% malpli multe ol la antaŭa. Rilate iujn ĉefajn branĉojn de la ĉina nacia industrio en Shanghai, en 1930, 65 el la 97 silkaj fabrikoj ĉesis labori kaj la 182 cigaredaj fabrikoj reduktiĝis ĝis 64; en 1934, 14 el la 19 tekstilaj fabrikoj de ĉinaj komercistoj malgrandigis sian produktadon aŭ ĉesigis sian laboron.

La reakcia regado de Jiang Jieshi multe malgrandigis la fortojn de Ĉinio, ke ĝi fariĝis objekto de traktado de imperiismaj landoj. Samtempe tio devigis la ĉinan popolon iri la vojon de unuigo kaj sinsavo. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ĝi disvolvis la ardantan revolucian movadon kaj batalis por renversi la diktatoran regadon de Jiang Jieshi kaj fondi novan Ĉinion sendepandan, liberan kaj potencon.



En la sudorienta parto de Pacifiko troviĝas malgranda insulo — Pask-insulo. Ĝin trovis nederlanda navigisto Jacob Roggeveen en la 5-a de aprilo, 1722 — la Pasko, pro kio ĝi ricevis la nomon. En 1888 la insulo estis aneksita de Ĉilio.

La insulo kun areo de 120 kvadrataj kilometroj distancas de la okcidenta marbordo de Ĉilio je pli ol 3,000 km. Ĝia ĉefa urbeto estas Hanga-roa kaj la loĝantoj plejparte estas polinezianoj kun bruna haŭto. La sterila insulo estas formita el lafo, tial oni kulturas tie nur ignamojn, tabakojn, ananasojn ktp.

En la pasintaj pli ol 200 jaroj, multaj misteroj sur tiu insulo restas ĝis nun nemalkaŝitaj, ekz. la ŝtonaj homfiguroj de Moai-oj. Ĉe la periferio de tiu insuleto fronte al onde-


Mistero de Pask-insulo

ganta oceano staras 600 kolosaj kaj plastikaj bustoj en tutaj pecoj el fajrodevena roko. Ili havas tro longan kapon, altan nazon, profundajn okulkavojn, longajn orelojn kaj elstaran buŝon. Kun longaj manoj

sur la ventro ili rigardas al la senlima maro, kvazaŭ iun atendantaj. Tiuj ŝtonaj bustoj ĝenerale altas je 7-10 metroj, ĉiu el ili pezas je ĉ. 90 tunoj, ili bonorde staras sur ŝtonaj sokloj altaj je pli ol 4 metroj kaj

Lignaj gravuraĵoj de la insulo estas tre ŝatataj de fremdlandaj turistoj.





Ŝtonaj homfiguroj de Pask-insulo



Insulanoj dancas indiĝenan dancon.

iu surkape portas cilindran ĉapon gravuritan el ruĝa roko. Sciencistoj trovis pli ol 300 grandajn ŝtonajn homfigurojn en la montoj de la sudorienta insulo. El ili la plej granda altas je 22 metroj kaj pezas je ĉ. 400 tunoj, la sola ĉapo pezas je 30 tunoj. Krome, oni trovis pli ol 40 misterajn kavernojn kaj multajn ŝtonajn homfigurojn ankoraŭ ne-finskulptitajn ekster la vulkano Rano-Raraku. En Orongo de la suda parto oni trovis ĝis nun nekonatajn hieroglifojn gravuritajn sur la ŝtonoj, kaj birdkapan homon. La legendo diris, ke tiuj ŝtonaj skulptaĵoj jam aperis antaŭ ol kiam la homoj enmetis siajn paŝojn sur tiun insulon. Sen maŝinoj disloki tiel multajn ŝtonajn bustojn sur la tuta insulo bezonis dek-milojn da laborfortoj. Kiuj veturis al la izola insulo trans oceano jam

en pratempo? De kie ili venis? Por kio ili skulptis la ŝtonajn homfigurojn per tiel grandaj fortoj? Kion la ŝtonaj bustoj de Moai-oj reprezentas? La misteroj de Pask-insulo vekis grandan intereson de multaj nuntempaj arkeologoj kaj sciencistoj, tial ili venis al ĝi unuj post aliaj por esplorado.

Rid-arboj

En botanika ĝardeno de Kigali, la ĉefurbo de Rvando en Afriko, kreskas stranga speco de arboj. Kiam vento blovas, ili eligas ridojn "ha-ha!". Je la unua aŭdo de tio la vizitantoj ofte konfuziĝas. Ili aŭdas ridojn, sed ne povas trovi la ridantojn. La lokanoj nomas tiu-specajn arbojn "rid-arboj".

Tiuspecaj arboj altas je 7-8 metroj, kun bruna trunko kaj ovalaj folioj. Sur ĉiu branĉo forkiĝo kreskas ŝela frukto simila al tintilo. En la frukto estas multaj rondaj stamenoj, kiuj povas libere ruliĝi ene, kaj la ŝeloj estas maldikaj kaj sekaj kaj surhavas multajn truetojn. La fruktoj ĉiam balanciĝas en la vento kaj tiam la rondaj ruliĝantaj stamenoj eligas "ha, ha!".

Stranga Moro

La basuto-anoj en la reĝlando Lesoto de Afriko plejparte kredas primitivan religion. En la kamparo estas multaj strangaj moroj pri naskiĝo, nomiĝo, geedziĝo k.a.

Pri naskiĝo de infano oni informas la patron per bastono aŭ akvo.

Se oni batas la patron per bastono, la patro komprenas ke la edzino naskis vir-bebon; se oni verŝas al li akvon, tio montras, ke la nov-naskito estas ina bebo. Post naskiĝo de la bebo, oni devas fari fendeton sur pojno, frunto, kruro kaj brusto per tranĉilo kaj meti en ilin medikamenton. Ĉar la basuto-anoj opinias, ke tio evitigas al la infano malbonan sorton.

Kiam gejunuloj geedziĝas, ili devas ŝmiri sian korpon per bovĝala likvo, iliaj kolo kaj pojnoj devas

porti braceleton kaj kolieron faritajn el bova graso trempita en droga likvaĵo por esprimi sanktecon kaj solenon. Estas strange, ke en la gaja geedziĝa bankedo la novedzino absolute ne devas montri eĉ ian ride-ton. La rido de la novedzino signifas, ke ŝi estas malobeema filino, ĉar ŝi volas forlasi siajn gepatrojn.

Cerboskuon al Vi!
de **GUO DAGUANG**



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondkuponono por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPC povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

LA RED.

* S-ro P. Bunschoten (67-j), Roerdomplaan 162, 7905 EK Hoogeveen, Nederlando, dez. kor. pri p.m., muziko, arto kaj naturo.

* Helena Byl (18-j lernantino), Rzepowo-10, 76-003 Sucha Kosz, W07, Koszalin, Pollando, dez. kor. kun junularo tutmonde pri ĉiutaga vivo kaj muziko.

* S-ino F. Howard, 38 Hampden Road, Hitchin, Herts. SG4 OLD, Britio, dez. kor. kun ĉin(in)o.

* j.p. Vluchtman, 35-jara lernanto senlerneja, Poŝtkesto 2568, 6401 DB-HEERLEN, Nederlando, deziras korespondi kun infanoj el diversaj bazlernejoj.



* Norberto Mollo, Asambleo 480, 6100 Rufino, Santa Fe, Arentino, dez. kor. kun s-anoj el Azio, Afriko aŭ Oceanio pri interŝanĝo de b.k., monerojn ktp.

* S-ano Bela Buru, 21220 Becej, Severa Djurkica 88, Jugoslavio, dez. kor. kaj interŝ. diversajn objektojn tutmonde, precipe kun ĉino.

* Jofe Abeledo Gonzalez, Virven de las Torres 4, 20 D, Sevilla-Espana, dez. kor. tutmonde.

* S-ro Vasil Velĉev (40-j instruisto), str. KJ. Ohridski 11, BG-5300 Gabrovo, Bulgario, dez. kor. kun aziaj landoj pri ĉiu temo.

* S-ro Veleoslav Ovĉarov (30-j maŝin-technikisto), str. Opalĉenska

22, BG-5300 Gabrovo, Bulgario, dez. kor. tutmonde pri ĉiu temo.

* Marek Kwiatkowski (22-j studento), ul. Kornicka 5, DS3, 61-132 Poznavi, Pollando, dez. kor. kun ĉina esp-istino.

* Ivana de Paula Stockler Hack, AV.N.S. De Copacabana, 420/1215, 22.020-Rio de Janeiro-RJ, Brasil, dez. kor. kun ĉina s-ano.

* S-ro Anthony Frith, 19 Mayfair Avenue, Romford Essex, RM6 6UB, Anglio, dez. kor. kun ĉina esp-ist(in)o.

* Andrzej Filipkowski (23-j fraŭlo), ul. Turystyczna 17/35, 44-335 Jastrzebie, Pollando, dez. kor. kun geamikoj tutmonde.

* S-ro Willie Falck (43-j rektoro de malgranda gimnazio), Fjellveien 27, 1927, Ranafoss, Norvegio, dez. kor. kun ĉina esp-isto pri ĉiuj temoj.

* Rodrigo Vaquera Marquez (27-j studento pri lingvoj), Alcludia, 11-10B, Camas (Sevilla), Hispanio, dez. kor. kun slavo pri iliaj lingvoj kaj kulturoj, ankaŭ kun hindoj pri sanskrita kaj india lingvoj.


* S-ro Amir Baŝir Bhati, H.32/10 Near Police Line-1, Basti Sadik Tali, Multano, Pakistano, dez. kor.

Kiel floroj ĵus plukitaj

En ĉi tiu antologio troviĝas poemoj de la 24-a jarcento a.K. ĝis la nuna tempo. Oni ne facile trovas tiel bonajn antologiojn de tradukita ĉina poezio eĉ en naciaj lingvoj. Al mi ne eblas kompari la tradukon kun la originaloj, sed la poemoj estas facile legeblaj kaj plaĉos al komencantoj kaj al "puristoj" pro la manko de neologismoj. En neniu poemo troviĝas superflua vorto kaj pro tio ili estas kiel floroj ĵus plukitaj de parnasa ĝardeno, parfumplenaj kaj kun gutetoj de roso ankoraŭ surpetale. Kiel enkonduko estas mallonga klarigo pri la ĉina klasika poezio. Libro bone presita kun alloga kovrilo.

Amador Diaz

—Heroldo de Esperanto



El Ĉina Poezio

Kolekto el 100 poemoj de antikvaj kaj modernaj poetoj de Ĉinio

Esperantigita de Prof. S. J. Zee
Eldonita de EL POPOLA ĈINIO

Libronumero: 10-Es-1526
148×210mm 156 paĝoj

Prezo: broŝ. £2.40 US\$4.90
bind. £2.90 US\$5.90

Mendu ĉe peranto de EPC
aŭ ĉe Esperanta Sekcio de GUOJI
SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Beijing,
Ĉinio



Silka portreto de **ZAMENHOF**

Formato: 27×40cm

Prezo: US\$ 4.50

Mendu ĉe Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ni petas peradon de landaj asocioj de
UEA kaj EPC-perantoj. La peranta
rabato estas 33%.

Insigno de EPC-Amiko


en formo de florkorbo, 18mm.

Prezo: US\$ 0.80 por unu

Rabato: 30% por 50

50% por 200 kaj pli

Mendu ĉe Ĉina Esperanto-Ligo
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio



La tibetanoj

La tibetanoj loĝas ĉefe en la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj en parto de la provincoj Gansu, Qinghai, Sichuan kaj Yunnan de Ĉinio. Ilia loĝantaro superas 3.4 milionojn.

Ili posedas riĉajn kulturajn kaj artajn heredaĵojn kaj konservas grandan kvanton da verkoj historiaj, geografiaj, astronomiaj, filozofiaj, medicinaj kaj literaturaj. Ili estas bravaj kaj senĝenaj kaj tre lertas en kantado kaj dancado. Iliaj popol-kantoj kaj ĉarmaj dancoj jam fariĝis artaj floroj bone konataj en Ĉinio.

Fotoj de YAN JIN



La danco "Bonaŭguro"



La danco "Luna Nokto"

Kantado en akompano de seskordaj muzikiloj




La danco "Aglo sur Neĝmonto"

Envaza miniatura pejzaĝo

Troviĝas diversaj artaj skoloj de la ĉinaj envazaj pejzaĝoj granda, mezgranda kaj malgranda. Ĉi tie ni konigas al niaj legantoj la envazan miniaturan pejzaĝon de Shen Yinchun. La diametro de liaj florzvoj estas nur 6-7 centimetrojn longa. Iuj el liaj vazoj havas eĉ nur grandecon de dikfingra ungo, tamen la arbo en ili estas forta kaj la branĉoj portas florojn en printempo kaj somero kaj fruktojn en aŭtuno.

Kiel konstatite, la envaza miniatura pejzaĝo ekaperis en Tang-dinastio (618-907 p.K.). Ĝi estas bela kaj riĉa je poezio. Oni ŝatas meti ĝin sur tablo por ornamo. Tial tiu arto longe daŭras sen velko.

Fotoj de REN REN



Shen Yinchun

